LOKO: BET-49 okazos en orientlitovia urbo regiona centro UTENA , kiu estas fondita en 1261 kaj estas unu el la plej malnovaj loĝlokoj de Litovio. En la urbo loĝas 35000 loĝantoj . Ghi okupas 1510 hektarojn de areo, tra la urbo fluas kvar riveroj, estas du belegaj lagoj. La urbon de chiu flankoj chirkauas lagoj, arbaroj kaj montetoj..En la teritorio de distrikto UTENA kaj proksime estas 186 lagoj kaj lagetoj , inter ili, la plej profunda (TAURAGNAS) , la plej longa (AISETAS) kaj la plej ŝatata (ALAUŠAS) en Litovio. Blazono de urbo UTENA estas orkolora hufumo - simbolo de felicho. BET-49 funkcios en moderne kaj bonege ekipita Kolegio de UTENA (pl. Utenio 2, 4) , kie estas luksaj kondiĉoj por laboro de BET-49. Partoprenantoj de BET-49 libere povos uzi chiujn ejojn kaj servojn de la Kolegio (salonoj, auditorioj, la plej modernaj teknikajhoj, muzikiloj, multaj komputiloj kun libera reta aliro, videoekipajhoj por internaciaj forestaj konferencoj k.s.).UTENA estas facile atingebla buse kaj automobile. BET-49 ghuos chiuspecan helpon kaj kunlaboron de urba gvidantaro. Retejo de la urba kaj distrikta municipo estas www.utena.lt (en litova kaj angla lingvoj), retejo de turisma informa centro de UTENA estas www.utenainfo.lt (en litova, rusa kaj angla lingvoj), retejo de Kolegio de UTENA estas www.utenos-kolegija.lt (en litova kaj angla lingvoj).

TEMPO: BET-49 funkcios la 6-an – 14-an de Julio , 2013. Veni al la arangho eblas jam la 5an de Julio.

PARTOPRENO: ni invitas chiujn esperantistojn. Speciale ni dezirus vidi esperantistojn el la landoj chirkau Balta maro, sed ankaŭ de chiuj aliaj najbaraj kaj pli foraj landoj. La kvanto de partoprenantoj ne estas limigita.

ANTAŬ KAJ POST BET-49 estas ebleco laŭ moderaj prezoj aktive ripozi en proksime de UTENA funkciantaj vilagaj altkvalitaj turismejoj kaj ripozejoj. Interesighantoj pri tio bonvolu aparte peti informojn ĉe Organiza komitato.

ALIGHKOTIZO: Ĝis la 31.03.2013: A) 60 lidoj por esperantistoj el Estonio, Latvio, Litovio.

B) 80 lidoj por esperantistoj el ekssovetiaj landoj.

C) 100 lidoj por esperantistoj el ekssocialismaj Europaj landoj.

D) 120 lidoj por okcidentanoj kaj egaluloj.

Ekde la 01.04.2013 alighkotizo por chiuj kategorioj kreskas plus je 30 lidoj (do, 90, 110, 130, 150 lidoj).

Infanoj , lernantoj kaj studentoj alighkotizon ne pagas. Pageblas en ajna konvertebla valuto. Unu euro egalas al 3,45 lidoj, la kurzo estas konstanta kaj ne shanghighas.

ALIGHO: por alighi necesas plenigi aldonatan alighilon kaj sendi ĝin al Litova Esperanto-Asocio: p.k. 167, LT-44287 Kaunas, Litovio. Eblas alighi telefakse +370-37-228616 aŭ rete al litova.ea@mail.lt . Samtempe pagu alighkotizon. Alighiloj riceveblas ĉe LEA.

PAGEBLECOJ : 1) sendi poshte al konto de kasisitino de BET-49 respondeca sekretariino de Litova Esperanto-Asocio Irena ALIJOSIUTE – SEB bankas, Konto Nr. LT447044060001341495, banka kodo 70440, BIC (SWIFT) – CBVILT2X..

2) pagi per kontanta mono dum la esperantistaj aranghoj al s-ino Irena ALIJOŠIŪTĖ kaj aliaj organizantoj de BET-49.

3) interkonsenti kun Organiza komitato pri alia pagmaniero.

4) esceptokaze konsente de OK pagi surloke che veno al la arangho, se ne eblas anticipa pago.

Alighkotizo ne estas repagebla. Aligho sen pago de kotizo ne validas (krom speciale interkonsentitaj kazoj).

LOGHADO: 1) en bonkvalitaj dulitaj kaj trilitaj chambroj en Studenta domo de la Kolegio, str. Maironio 18 (necesejo kaj lavujo por du chambroj , komunaj dushejoj kaj kuirejo por chiuj chambroj de la etagho). Unu lito por unu tagnokto kostas 30 lidojn. La prezo ne inkluzivas matenmanghon.

2) en specialaj pli bone ekipitaj gastochambroj de la Kolegio , str. Maironio 18. Unu tagnokto kostas 70 lidojn. La prezo ne inkluzivas matenmanghon.

3) eblas mendi chambrojn en urbaj hoteloj-gastejoj.Ni rekomendas bonajn tristelajn gastejojn „Utrana“ (str. Aušros 36A) kaj „Filomena“ (str. J.Basavičiaus 101). Unulita chambro kostas 90 lidojn tagnokte, dulita – 140 lidojn tagnokte. Hotelaj prezoj inkluzivas matenmanghon. Interesighantoj petu pli detalajn informojn aparte. Organiza komitato rezervas chiujn chambrojn de gastejo „Utrana“. Tiujn chambrojn eblas vidi en retejo de turisma informa centro de UTENA www.utenainfo.lt .

Prezoj en Studenta domo ne inkluzivas matenmanghon .Pagu anticipe same kiel alighkotizon, dezirinde laueble pli frue, esceptokaze eblas pagi ankau surloke veninte dum registrado. Organiza komitato devas anticipe scii kvanton de loghantoj kaj kie.

MANGHADO: Matenmanghi eblos en bufedo de Studenta domo, tio koston 10 lidojn tage. Tagmangho estas organizata en domo de Kolegio, kie okazos chiuj programeroj – bonkvalita tagmangho koston 15 lidojn tage.

Pagu anticipe same kiel alighkotizon, laueble pli frue, esceptokaze eblos pagi ankau surloke veninte dum la registrado. Organiza komitato devas anticipe scii kvanton aparte de matenmanghantoj kaj de tagmanghantoj. Vespermangho ne estas organizata. Tion eblas fari libere en urbaj kafejoj kaj restoracioj.

GRAVE: Esperantistoj, kiuj grave kontribuos al la programo de la arangho au/kaj signife helpos organize, pro loghado (krom hoteloj) au manghado lauelekte ne pagos.

PROGRAMO : tradicia, t.e. somera universitato, paroligaj kaj perfektigaj kursoj, literaturaj aranghoj, muzikaj kaj artaj vesperoj, debatoj pri situacio kaj problemoj de Esperanto-movado en Baltiaj landoj,

tradukista kurso, pedagogia seminario, seminario de klubestroj kaj aktivuloj, movada lernejo, sciencteknikaj kaj fakaj aranghoj, instruado de kantoj, junularaj aranghoj, konkursoj, kvizoj, distraj programeroj, ekskursoj tra la urbo kaj aliaj apudaj vidindajhoj, diskutoj, forumoj, libroservo, interkona vespero, diservo, baza konatigho kun litova lingvo kaj kulturo, ekspozicioj, filmoj kaj lumbildoj, gazetara konferenco, sportaj ludoj, oficiala malfermo kaj fermo, adiaua vespero k.a..

Organiza komitato atendas proponojn, sugestojn, ofertojn por la programo, ankaŭ sinproponojn.

VIZOJ: al Litovio senvezite rajtas veni civitanoj de ĉiuj landoj de Europa Unio kaj de multaj aliaj landoj. Aliaj vizojn havigu en Litoviaj ambasadejoj kaj konsulejoj en diversaj landoj. En problemaj kazoj turnu Vin por helpo al Litova Esperanto-Asocio. Se necese, LEA povas sendi oficialan inviton.

ALIAJ GRAVAJHOJ: Ni antaŭvidas eldonon de ĉiutaga gazeto dum la tuta periodo de la arango. Aktualajn informojn pri BET-49 Vi povas trovi en retejo de Litova Esperanto-Asocio www.esperanto.lt ,

ALIGH-KONTAKTADRESO: p.k. 167, LT-44287 Kaunas, Litovio, Litova Esperanto-Asocio. Poshtelefonoj de LEA estas +370-687-12219 kaj +370-686-69875 . Telefakso estas: +370-37-228616. Retadreso de LEA estas :litova.ea@mail.lt ; pjgorovas@takas.lt kaj irenaa@takas.lt .

BONVENON AL LITOVIO !

Organiza komitato

09.12.2012

III-a INTERNACIA FESTIVALO DE E-KANTO, RECITADO, ORATORA KONKURSO

05-07.04.2013 KARLOVO-SOPOT BULGARIO

ORGANIZANTOJ : Bulgara E- Asocio , AIS Bulgario, Intrenacia Universitato Karlovo

Regionaj komitatoj de kulturo-Karlovo , Sopot

ALTAJ PROTEKTANTOJ : D-ro Emil Kabaivanov- Urbestro de Karlovo

Veselin Ličev- Urbestro de Sopot

KATEGORIOJ por la festivala konkurso-La premioj por partopreno la konkursan programon estos distribuotaj surbaze de la aĝo

-I -a grupo- infanoj ĝis 12 jaraĝaj -

-II- a grupo- gelernatoj ĝis 18 jaraĝaj

-III-a grupo gestudentoj kaj gejunuloj ĝis 35 jaraĝaj

-IV-a grupo aĝuloj 36-50 jaraĝaj

-V-a grupo pli aĝaj ol 50 jaraĝaj

En ĉiu grupo aparte estos distribuo de la premioj por individua kaj grupa partopreno/koruso/

TEMOJ por la ORATORA KONKURSO :

ESPERANTO-la plej bona solvo de la problemo pri internacia lingvo

ESPERANTO kaj la EŬROPA UNIO

ESPERANTO kiel rimedo por la interrilato de la homoj

ESPERANTO en la literaturo kaj poezio

LA TRADUKADO el nacia lingvo en Esperanton kaj male

ESPERANTO kiel familia lingvo

ESPERANTO en INTERRETO

ESPERANTO en la hodiaŭa tutgloba mondo

ESPERANTO-la lingvo de la estonta Eŭropo

KIO estas por mi ESPERANTO ?

TRANOKTADO: en komuna loĝejo- po 7 euroj por unu tranokto

en hoteloj 20-50 euroj por unu tranokto

ALIĜKOTIZO 6 euroj por la partoprenontoj festivalan programon /por gelernantoj kaj gestudentoj la aliĝkotizo estas 2 euroj/

12 euroj por gastoj

INTERKONA VESPERO KUN VESPERMANĜO en restoracio- 10 euroj

FESTIVALA BALO kun komuna vespermanĝo- 15 euroj

TAGMANĜOJ- po 5 euroj

POSTFESTIVALA FERIADO 'KARLOVA PRINTEMPO"/7-15.04.2013/

Ripozado kaj ekskursoj al diversaj proksimaj de Karlovo urboj/Plovdiv Kalofer.Kazanlak
Bac^kova monakejo,Trojan k.a/Sen aparta aliĝkoto .Tranoktado en komuna loĝejo kaj hoteloj /
Rimarko :partoprenontoj la Festivalon kaj la Ferialon kiuj tranoktos en la komuna loĝejo uzos rabaton
pagonte 50 eurojn por la tuta tranoktado- 10 tranoktoj/

LIMDATO POR RICEVO DE ALIĜILOJ- 30.03.2013 /La aliĝkotoj ,kotoj por la tranoktoj en la
komuna loĝejo,vespernaĝoj estas pageblaj al bankokonto aŭ surloke, sed la aliĝiloj devus esti
sistempe senditaj por rezervi la tranoktojn/

INVITILETOJ por bezonataj bulgaraj vizoj – kontaktu tuj kun la Organiza komitato

ADRESO POR ALIĜO KAJ INFORMOJ :Bulgario 4300 Karlovo p.k.44 ESPERINFORM

Retadreso : E-mail: leonov@rozabg.com /preferinde skribu rete /

Telefonoj : +359 885056469 /tage kaj nokte/ +359 335 5-50-50/nur vespere/

Numero de la bankokonto : Bulgario

BG 12 UNCR 9660 4422 0221 08

BIC/SWIFT/ kodo de Uni Credit Bulbank UNCRBGSF

Prof. Bojidar Stefanov Leonov

/por la Festivalo/

ALIĜILO

Nomo.....Telefono.....

Adreso.....Naskiĝtago.....

Mi partoprenos la Festivalan programon per kanto JES/NE recitado JES/NE

oratoran konkurson JES/NE

Mi deziras tranokti en komuna loĝejo JES/NE

hotelo JES/NE /la tranoktoj en la hotelo devus esti antaŭpagitaj

sendonte la sumon al la bankokonto/

Mi deziras partopreni la interkonan vesperon kun vespermanĝo 5.4.2013 JES/NE

Mi deziras partopreni la Festivalan balon kun vespermanĝo 6.5.2013 JES/NE

Mi deziras tagmanĝi 5.4 JES / NE 6.4.JES/ NE 7.4. JES /NE

Mi estas vegetariano JES/NE

Mi deziras partopreni la Feriadon "Karlova printempo " JES/NE

.....2013

Subskribo

SENDU LA ALIĜILOJN PREFERINDE TUJ AŬ ĜIS 30.03.2013 !

Artikoloj

La influo de albano al neŭtraleco de Svisio



Prof. Astrit Leka

La historiaj cirkonstancoj estis tiaj ke Merkur Bua Shpata, albana bravulo, gvidanto de la albana ĉevalrajdistaro je la servo de Venecio, trafis la batalejon ĝustatempe.

La ties eniro en la milito skuigis la militistan gvidantaron de 40 000 svisoj, des pli ke ties soldataro ekkriegis "San Marko! San Marko!

Jarojn antaŭe, mi devis esplori en la historion de Svisio por ĉerpi argumentojn pri la rilato de nia nacia heroo Skanderbeg kun tiu lando. Ĉi laboron mi faris laŭ la skriba mendo de s-ro Flavio Konti, prezidento

de la Svisa Konfederacio, same estro de OSCE tiutempe, por subteni per agumentoj la demandon por starigo de la busto de Skanderbeg en Svisio. Oni postulis donitaĵojn pri la rilatoj de ĉi tiu granda albana figuro kun la historio de Svisio.

Kontraŭe, la lokaj aŭtoritatoj ne povis akcepti la demandon. Mi sukcesis trovi, ke kiam Genevo estis okupita ununokte de Duko de Savoja, la ties estraro komencis urĝe plifortigi la senton de patriotismo per ĉiuj manieroj. Unu el ĉi tiuj formoj estis la eldonado de la libro pri Skanderbeg franclingve el 1000 paĝoj de la franco Laverden. La genevanoj presis la libron, pro urĝeco, en du presejoj kaj disdonis ĝin en la loĝantaro el 14 000 personoj de tiutempa urbo. La celo estis pliigi la kredon de ties popolo pri la valoro de la rezistado kontraŭ Dukon de Savoja, granda tiutempa potenco, kun intimaj rilatoj al Austrio kaj Hispanio. La Duko volis ĉiakondiĉe igi Genevon ĉefurbon de liaj posedaĵoj.

La ekzemplo de la heroeca rezistado de Skanderbeg estis selektita en la tuta eŭropeca historio ĉar li gvidis malgrandan popolon kaj savis la sendependecon dum 25 jaroj, militante kontraŭ tre granda malamiko kiel estis la Otomana Imperio, la plej potenca tiutempe, gvidata de la glora sultano Mehmet la Dua. Ĉi tiu argumento kaj kelkaj aliaj servis al mi por akceptigi la projekton de nia asocio "Solidest" (Internacia asocio por la disvolvado de la popoloj de Oriento) por starigi la buston de Skanderbeg en Genevo. Des pli, tio okazis en la jaro 1997, kiam la imago de Albanio prezentiĝis antaŭ la mondo en la plej malalta stato dum la ties historio. La busto de Skanderbeg eniris kiel la unua rememorigilo de nacia heroo de alia popolo en la svisa tero.

La titolo de la decido pri la akcepto de mia demando, kiun la registaro de Genevo alskribis min jenis: Paca mesaĝo por Albanio.

Ĉi tiu esplorkonferenco por defendi nian projekton pri la busto de Skanderbeg en Genevo ebligis al mi profundigi ĝin ia skalo en la historio de mem Svisio.

Fakte, antaŭ ol oni akceptu la projekton envorte, en la baza libro de Genevo, eldonite en la jaro 1993, estis agnoskita ke la nomo de Genevo devenis de la ilira lingvo parolata de popolo loĝanta sude de Balkanio (do de albanoj).

Tion jam konfirmis aliaj grandaj sciencistoj.

La busto stariĝis ĝuste borde de la plej granda lago de Eŭropo, post Ladoga, formita de la rivero Ron, fronte al la Blanka Monto, la plej alta en Eŭropo kaj al la plej riĉa kvartalo de Genevo, kie vivas Alen Delon, familio de Aga Kan, Sofie Loren ka, apud la domoj de la institucioj de Unuiĝintaj Nacioj.

En la serĉadoj mi renkontiĝis kun albana personeco, Merkur Bua Shpata, pranepo de Gjin Bua Shpata, ludinta tre gravan rolon en la historio de la tuta Svisio. Kiu estas Merkur Bua Shpata, grafo de Akuino kaj Rokaseka, de la Sankta Romia Ĝermana Imperio?

Li estas posteulo de la princa familio albana de Gjin Bua Shpata, je deveno de la marbordo de nuna Albanio, instalita en Peloponezo. Liaj antaŭuloj estis iam despotoj de Angelokastro kaj Arta, same baronoj de Moreo.

Post la otomana invado de la helena duoninsulo, Petro Bua, patro de Merkur, estis proklamita prezidanto de la albanoj de Grekio.

Petro Bua elmigris en Apeninan duoninsulon. Tie, Merkur sin distingis kiel militiston kaj bravan gvidanton de la albanaj kaj balkanaj mercenaroj.

Oni devas mencii ke la mercenarismo tiutempe estis honora profesio kaj aprecita de historio.

Merkur Bua estis konate kiel unu el plej bravaj militistaj komandantoj de Eŭropo je la fino de XV jarcento, komenciĝo de XVI jarcento. Kien ajn li iris por militi, rezultiĝis venkinto. Aliance kun Venecio, en la jaro 1496 li venkis



- Portreto de Merkur Bua Shpata verkite de Lorenzo Lotto

kontraŭ fiorentinoj, milananoj kaj kontraŭ francoj ĉekape de Luigi VIII.

Kiel aliancano de Luigi XII de Francio li venkis hispanojn. En la jaro 1506 komisiite de francoj, li savis Papon Julius II, grave frakasinte la fortojn de la tirano de Bologna, Giovanni Ventivolio.

Merkur Bua troviĝis ĉebrate al la imperiestro ĝermana Maksimiliano la Unua kontraŭ la ribeliĝintaj fortoj.

Li eĉ atakis ankaŭ siajn veneciajn alianculojn kaj venkis ilin, por daŭrigi per siaj venkoj kie ajn li pasis kun la albanaj ĉevalrajdistoj.

La greka historiisto, Koroneo, diras pri Merkur Bua-n ke "li estas aŭtenta posteulo de Pirro, de Akilo, de Enea kaj de Aleksandro la Granda". Iu poeto verkis poemon el miloj da versoj kie li priskribis la heroecajn faritaĵojn de Merkur Bua, simile al Eneido de Virgilio. En la jaro 1515, la 13-14-an de septembro, okazis la granda batalo de Marinjano, apud Milano, kiu nomiĝis en historio kiel la "Batalo de gigantoj", pro la amasa partopreno de la plej gravaj armeoj de Eŭropo. El Francio alvenis Francesko la Unua, la armeoj de Papo, la armeo de Venecio, la svisa armeo, ties kontraŭulo, kaj la armeo de Maksimiliano, ĝermana imperiestro.

En la batalo de Marinjano, la 13-an de septembro, ŝajnis venki jen unu jen la alia flanko.

Eĉ mem la reĝo Francesko vundiĝis. La morgaŭon, ĉirkaŭ tagmezo, la svisoj sturmis kaj estis venkinte la francojn. Tiam, la reĝo de Francio demandis la intervenon de 40 000 soldatoj de Venecio.

La peza infanterio de Venecio dum la tempo kiam la francoj estis venkate, lokiĝis en Lodi, kvar horojn fore per piedo disde la batalejo. Do, kiam ĝi alvenus, la svisoj estus jam venkinte la batalon.

La historiaj cirkonstancoj volis ke Merkur Bua Shpata, la albana bravulo, la gvidanto de la albana ĉevalrajdistaro je la servo de Venecio, atingu ĝustatempe la batalejon.

Lia eniro en la milito skuigis la militistan gvidantaron de 40 000 svisoj, des pli ke amaso de ties soldatoj ekkriis "San Marko! San Marko! (t.e. alvenis la ĉevalrajdistaro de Venecio helpe al Francio).

Pensante ke temis pri 1000 albanaj ĉevalrajdistoj, ĝi decidis retiriĝi akceptante la disfalon. Envere tie enirintis nur 300 albanaj ĉevalrajdistoj. Merkur Bua, kvankam vundita, sukcesis kapti 6 blazonoj kaj kvar kanonoj de la svisa armeo.

La batalo estis gajnita de li. La historiistoj diras ke disfalis la svisa armeo kiu dum 1500 jaroj, ekde la tempo de Jul Cezaro, apenaŭ konintis disfalon. Prokrastiĝo malpli ol unu horo de la alveno de Merkur Bua en la batalo de gigantoj, laŭ historiistoj, donacus la venkon al la svisoj.

Oni skribis ke, la vesperon de tiu tago de la venko, la reĝo



- La blazono de la familio de grafo Merkur Bua

Francesko la Unua, festante la venkon, prezentis Merkur Bua Shpata-n vunditan, kiel savinton de sia vivo. Historiistoj estas atribuintaj la venkon al Francesko la Unua, reĝo de Francio. Sed reĝo 21 jara baptate unuafoje tiun tagon, apenaŭ povus esti la stratego de la venko de la batalo de gigantoj. Tio pruvigas ankaŭ per la fakto ke, dek jarojn poste, en la batalo de Pavia, la reĝo Francesko la Unua, la iaman alianculon Merkur Bua Shpata havis ja kontraŭulon. Li estis venkita, eĉ militkaptita kaj se ne estus la autoritato de Merkur Bua Shpata li ankaŭ povus esti mortigita de la katalanaj mercenaroj.

Merkur Bua Shpata forprenis de katalanoj la reĝon Francesko la Unua kaj honorigis lin kiel reĝon, kiel alianculon kaj vasalon iaman kaj petis lin elekti la postsekvantaron kaj traktiĝu reĝe. Lia armeo devus resti militkaptiton de la venkinto por ke interŝanĝiĝu konforme al la tiutempaj reguloj. Post tiu ĉi protektiga kaj honoriga traktado flanke de Merkur Bua Shpata, Francesko la Unua alskribis al sia patrino leteron kie interalie esprimas la famiĝintan frazon kiu nuntempe menciatis vaste: “Ni estas perdintaj ĉion krom la honoron”!

Laŭ mi, tiu frazo estas ia kontribuado de la albana kulturo al la monda kulturo.

La svisa genieco, la grandan historian disfalon en la batalo de Marinjano kie oni diras ke estas mortigitaj 12 000 svisoj kaj 10 000 francoj kaj miloj aliaj, transformis en venkon, kial?

Ĉar ĉirkaŭ du monatoj pli poste, la svisoj kunvenis kaj decidis ke neniam plu ili eliru ekster la siaj landlimojn, kiel okupantojn, samkiel ili estis agintaj ĝistiam. Ili proklamis neŭtralecon, ne limigante la sendon de siaj mercenaroj eksterlanden por pli enspezigi sin, io normala por tiu tempo. La itala regiono de Ticino, ĉikaze, fariĝis svisa.

Strekante historian paralelon nesimetrian, kun la batalo de Kosovo en la jaro 1389, Miloŝeviĉ anstataŭ trovi la vojon de rekonsciiliĝo de Balkanio kaj nature de mem Serbio, elektis la vojon de profundigo de la interetna konflikto. Kontraŭe al la geniaj svisoj, la perdon de la batalo de Kosovo li transformis en tombon de Serbio.

Por mi, Svisio dediĉas sian kvinjarcentan neŭtralecon tiom utila por ĝi (escepte de la Napoleona periodo 15 jara) al la albano Merkur Bua kaj certe al svisa genieco, transforminta la perdon al venko. Sen tiu disfalo en la batalo de Marinjano kiun Svisio transformis en scio, ĝi apenaŭ estus tio kio jam estas, sed sekvus la vojon de kreado de svisa imperio same kiel tiu austro-hungara kiu, post la Unua Mondmilito, reduktiĝis en la nuna Austrio “taniĝinta”. La rezultatoj de ĉi tiuj esploroj mi estis transdoninta, preter ceteraj periodecaj donitaĵoj pri Kosovo kaj pli vaste, al la ministrino de eksteraj aferoj de Svisio, Miŝelin Kalmi Re. Certe ke tio influis ĉe ŝi, ĉar pli poste, kiam mi estis en Berno, en iu solenaĵo, haltigis min unu el la ties oficistoj kaj sciigis ke “la Ĉefino estas dirinta al la ties dependuloj ke la neŭtralecon ni estas akiritaj danke al albanoj”. Mi deduktis ke ŝi estas utiliginta ĉi eventon historian por bazigi la konstantan protektadon al la albanoj.



- La blazono de grafo Merkur Bua Shpata agnoskita de la sankta romia imperiestro Maksimalian (1510)

Analiza novaĵletero de la Veromovado de Berkshire, Britio:

januaro 2013 (2013-02-02)

Berkshire 9/11 Truth

<http://www.berkshire911truth.org.uk> (retestro: David Bowman)

<http://berkshire911truth.blogspot.com/> (novaĵleteroj: Ian Fantom)

- Malio: Parlamentanoj elparolas kontraŭ misi-vastiĝon
- Ĉu invado de Malio estas orvela fatamorgana milito?
- In Armenas: ĉu kulpis la homoj al kiuj pagis MI6 por mortigi Gadafi?
- Afriko: Ĉu ĝi povus esti la venonta Vjetnamio?
- Sandy Hook: Ĉu estis usona Operacio Gladio?
- Kampanjanto kontraŭ SOPA, Aaron Swartz: ĉu estis murdo?
- Max Keiser kun Alex Jones: Faŝismo jam alvenis
- La morto de flegistino Jacintha Saldanha : ĉu estis kiel ŝajnis esti?
- 911-militoj: pluaj paŝoj al novaj nurembergaj procesoj
- Io malĝustas – kaj ĉio dependas de mi!

Antaŭ jaro mi skribis: "Jam forpasis januaro, kaj ni ankoraŭ ne scias kontraŭ kiun ni militos ĉi-jare. La Establaĵo forte strebas ion aranĝi, sed ŝajnas, ke ĝi havas problemojn". Nu, nun ni ja scias; estis Sirio.

Estis kaŝa milito, prezentita de politikistoj kaj la amaskomunikiloj tiel ke Prezidento Assad malracie bombas siajn proprajn homojn, kiuj reagis per popolveiĝo kontraŭ lin. Iomete post iomete la subteno de NATO estis konfesita. Sed ili prenis unu paŝon tro, en malstabiligo de lando kun rusa milita mar-bazo. La rusoj kaj la ĉinoj ŝajne desegnis linion en la sablo, kaj do la militinstigantoj de NATO nun rigardas pli suden.

* Malio: Parlamentanoj elparolas kontraŭ misi-vastiĝon

Ĉi-jare estas Malio. Estas milito pri kiu okupiĝas la Establaĵo sen la volo de la popolo. Francio ensendis trupojn por kontraŭi invadon de ĝuste la trupoj kiujn NATO armadis kaj kuraĝigis kiam ili malstabiligis Libion. Laŭ International Business Times de la 20a de januaro, "La Ministrejo de Eksterlandaj Aferoj diris al IB Times UK, ke estas absolute neniam ŝanco ke estos deplojitaj surgrundaj trupoj por helpi la strebojn de Francio kaj koalicio de trupoj el afrikaj landoj"

(<http://www.ibtimes.co.uk/articles/425925/20130120/mali-france-islam-war.htm>). Ĉiukaze, ajna helpo al invado estas milit-ago.

La subministro pri eksterlandaj kaj komonveltaj aferoj, Mark Simmonds, jam faris deklaron al la parlamenta Ĉambro de Komunumoj la 14an de januaro, en kiu li skizis la britan helpon al la franca invado, asertante, "La ĉefministro akceptis la francan peton por limigita loĝistika subteno, kaj direktis la Ĉefon de la Defendo-Stabo havebligi flugmaŝinojn". Li asertis ankaŭ, ke EU konsideras milit-trejnman mision en Malio, kaj ke Britio estos parto de tio. "Aldone", li asertis, "malgranda taĉmento da teknika personaro estas deplojita al la flughaveno de Bamako por helpi kun la akcepto de britaj flugmaŝinoj". Li ankaŭ certigis al la parlamenta ĉambro, ke "Britaj fortoj ne entreprenos batalan rolon en Malio" (<http://www.publications.parliament.uk/pa/cm201213/cmhansrd/cm130114/debtext/130114-0002.htm>).

Pri la lasta ero daŭrigis Bob Stewart, dirante, "La ĉambro plene komprenas, ke neniuj batal-trupoj estos deplojitaj, tamen teknika personaro estos sendita al la flughaveno de Bamako por servi al la grandaj flugmaŝinoj, kiuj supozeble enportos ekipaĵon kiel ekzemple tankojn. Kiam tiuj flugmaŝinoj surteriĝos, ĉu tiu teknika personaro inkluzivos personaron por perforta protektado, eventuale inkluzive de personaro el la 'RAF Regiment' [taĉmento de la flugarmeo], kiu efektive estas soldatoj?". Li ne ricevis rektan respondon.

Veterana kontraŭ-milita kampanjanto (kaj cetere Esperanto-subtenanto) Jeremby Corbyn, demandis al la ministro: "Ĉu li zorgas pri misi-vastiĝo, kaj la senintencaj konsekvencoj de la okupiĝo de Britio kaj Francio en milito kiu kreskigos la fortojn kiujn li provas kontraŭi, anstataŭ alporti la politikan trankviligon, kiu necesas por atingi pacon kaj prosperon por la homoj de tiu lando?". Sekve de la ideo de 'misi-vastiĝo', alia kontraŭ-milita veterano, Paul Flynn, demandis "Kial denove ni?". Ni havas neniajn post-koloniajn devojn al Malio. Eĉ sen misi-vastiĝo, ni jam estas malfermaj al eventualaj teroristaj reprezalioj, pro la agoj kiujn ni jam entreprenis. Ni atestis pri la perdo de 618 britaj vivoj en du militoj, en kiuj estis malmulte da rekta minaco al britaj interesoj. Kial la registaro tiom volegas riski la vivojn de britaj civitanoj por fariĝi la policano de la mondo?". Venis neniuj respondoj.

Plue estis anoncote, ke Cameron sendos 200 trupojn al Okcidenta Afriko, en granda intensigo de la brita aktiveco (<http://www.dailymail.co.uk/news/article-2269818/British-soldiers-west-Africa-weeks-Cameron-sends-200-troops-major-escalation-UKs-involvement.html>). Iros kvardeko rekte al Malio por operacii sub EU-komando. Do tuj ni vidas, ke David Cameron malmulte influos la manieron en kiu tiuj trupoj estos deplojataj. "Ili ne servos ĉe la fronta linio, sed estos en rezervo por provizi la komencan porcion en deplojo kiu povus fariĝi pli granda", raportis Daily Mail. Do kion signifas 'en rezervo'?

Kaj la nombroj daŭre pligrandiĝas ...

Sed en la belga parlamento, Laurent Louis rekte kaj eksplicite atakis la invadon de Malio (<http://dotsub.com/view/ce723de9-d295-4a2e-83aa-122f5a6d2fdc>). Li parolis france, kaj estas subtitoloj en la angla. Estus utile se iuj bonuloj subtitolus ankaŭ en aliaj lingvoj, uzante la sistemon 'dotsub.com', ĉar tiu estis vere grava parolado.

Li menciis la interesojn de la franca ŝtata kompanio Areva en deponoj de urano en Malio, kiujn bezonas

por teni funkciaj la francaj nukleaj elektrofarejoj. Cetere, Reuters dismetis raporton titolitan 'Francio ordonas specialajn fortojn por protekti uranion de Niĝero', dirante, ke ili estis sub minaco de la ribelantoj (<http://www.reuters.com/article/2013/01/24/us-mali-rebels-niger-areva-idUSBRE90N0K820130124>). Ŝajne estas tie ankaŭ or-deponoj.

* Ĉu invado de Malio estas orvela fatamorgana milito?

Tamen kiuj estas la ribeluloj, kaj kie ili estas? Richard Cottrell pasintjare aŭtoris la libron 'Gladio, NATO's Dagger at the Heart of Europe' [Gladio, La ponardo de NATO ĉe la koro de Eŭropo], kaj li skribis al mi, demandante: "Ĉu tiu estas fatamorgana milito? Ĉu okazas ajna 'milito'? Aŭ ĉu tiu estas nura transpreno kaj okupo ... --- estas stranga milito sen bataloj aŭ bilda pruvaĵo". Li sendis al mi ligilon al artikolo de Al Jazeera de la 27a de januaro, titolita 'Maliaj ĵurnalistoj malesperas pri "nevidebla milito"', laŭ kiu "Raportistoj luktas por labori, dum realiĝas vetur-malpermesoj, kaj ne estas publikigitaj oficialaj informoj kiaj morto-nombroj (<http://www.aljazeera.com/indepth/features/2013/01/2013127154355125483.html>).

Mi respondis, ke mi jam havis similajn zorgojn pri Afganio. Certe estis mortigataj trupoj, sed fare de kiu? Richard Cottrell respondis: "Pli kaj pli mistere. Neniu raportistoj. Neniu bildoj de la batalado. Neniu fluoj de rifuĝintoj blokantaj la stratojn. Tiu aspektas kiel okupo efektiva sub preteksto. Jes, kaj vi ja povus pravi pri Afganio. Ĉu ne la tuto pensigas vin pri 1984? Militoj daŭras eterne, sed ili estas nur raportitaj, ne atestitaj en ajna vida maniero".

Poste, la 29an de januaro estis raportoj, ke Timbuktu estis kaptita, kun nenia rezisto, kaj ke, kiel envortigis BBC: "La ĵihadistoj fordegelis en la dezerton" (<http://www.bbc.co.uk/news/world-africa-21227053>). Kiel povas signifa milit-forto tutsimple "fordegeli en la dezerton"? Ĉu ne tiuj homoj havas aliron al satelita bildigo (<https://maps.google.co.uk/maps?q=Timbuktu>)? Le Monde publikigis 'Vokon por atestaĵo'. "Vi estas en Malio; kiel vi spertas la francan intervenon?" ili demandas (http://www.lemonde.fr/afrique/article/2013/01/28/les-forces-francaises-et-maliennes-atteignent-tombouctou_1823303_3212.html). Iuj legantoj havas similajn dubojn.

* In Armenas: ĉu kulpis la homoj al kiuj pagis MI6 por mortigi Gadafi?

Ni plue havas la strangan kaj tragikan atakon kaj la ostaĝo-kapton ĉe la gas-fabriko In Amenas en Aĝerio. Ĉu vere eskapis la atenton de la tradiciaj amaskomunikiloj, ke tiu gas-fabriko situas nur 25 km for de la libia landlimo? Kiu vere plenumis tiun ŝokaĵon? Ĉu ankaŭ tiu estis plenumita ĝuste de iuj el la homoj kiun NATO armadis kaj kuraĝigis en la malstabiligo de Libio? Ĉu eblas ke ili ankoraŭ subtenas la samajn homojn? Iu ajn kiu scias pri la Sekretaj Armeoj de NATO kaj pri Operacio Gladio spertus nenian malfacilon en kompreno de tiu eventualaĵo. Ĉu ilia nuna celo povus esti malstabiligi Alĝerion? Ni ne miru, ke la Alĝeria registaro ne konsultiĝis kun NATO-landoj antaŭ ol eniri.

Multaj gazetoj ĉirkaŭ la mondo ligis tion al la franca milit-operacio en Malio

(<http://www.bbc.co.uk/news/world-africa-21081766>), sed se tio estis la situacio, tiukaze la plenumintoj devus esti antaŭ-avertitaj pri la franca operacio por tiom kompleksa atako. London-bazita risko-taksa kompanio, Exclusive Analysis, avertis pasintjare pri tia atako ĉe In Amenas (http://www.cnbc.com/id/100410586/Experts_Had_Warned_of_Attack_on_In_Amenas_Gas_Plant). La gazeto Daily Mail raportis, ke la operacion gvidis blank kanadano, kaj ke du britoj estis enplektitaj (<http://www.dailymail.co.uk/news/article-2265518/Algeria-crisis-Algerian-forces-Canadians-Frenchman-bodies-gas-plant-gunmen.html>). Plue, Kurt Nimmo, verkante en Infowars, malkaŝis, ke Mokhtar Belmokhtar, kiu akceptis respondecon esti la cerbulo malantaŭ la atako, kiel gvidanto de la islamista grupo al-Mulathameen, estis varbita kaj trejnita de CIA en Afganio. Belmokhtar revenis al Alĝerio en 1993, kaj aliĝis al la 'Salafista Grupo por Predikado kaj Batalado' (GSPC), kiu pli poste ŝanĝis sian nomon al 'Alkaida Organizaĵo en la Islama Maghreb' (AQIM), kiu alianciĝis kun la 'Libio Islama Batal-Grupo' (LIFG). "LIFG estas kaŝe subtenata de CIA kaj la brita MI6", asertis profesoro Michel Chossudovsky de Global Research (<http://www.globalresearch.ca/al-qaeda-in-the-islamic-maghreb-whos-whos-who-is-behind-the-terrorists/5319754>). La 30an de decembro 2012, jam raportis La Rouche, ke LIFG estas regata de la britoj (<http://larouchepac.com/node/25000>). Tiu artikolo baziĝis sur raporto 'A View to Extremist Currents in Libya' (Expanded version) [Vidpunkto pri Ekstremistaj Fluoj en Libio (Ampleksigita Versio)] de strategia konsil-firmao KRONOS (http://www.kronosadvisory.com/KRONOS_AViewToExtremistCurrentsInLibya_ApprovedForDistribution.pdf). LIFG estis la organizaĵo kiu havis ligojn kun MI6 rilate al murdo-atenco al Muammar Gadhafi en la 1990aj jaroj, laŭ la malkaŝoj de MI5-oficisto kiu fariĝis malmaskanto, David Shayler. La raporto de KRONOS iom detaligas tiun reton.

* Afriko: Ĉu ĝi povus esti la venonta Vjetnamio?

London-bazita Patrick Henningsen raportis en Russia Today pri la ligo inter ILFG kaj Africom (<http://www.globalresearch.ca/us-africom-underway-with-mali-keeping-china-out-of-africa/5319694>). Africom estas militserva aparato starigita de Prezidento George S Bush por antaŭenigi usonajn interesojn en Afriko, kaj estas bazita en Germanio (<http://www.africom.mil>). La 13an de oktobro pasintjare Global Research publikigis artikolon 'America's Secret War in Africa: Spreading drone warfare throughout Africa' [La sekretaj militoj de Usono en Afriko: Vastigante flugaparatan militadon tra Afriko] (<http://www.globalresearch.ca/americas-secret-war-in-africa/5307958>). Oni neniam kredu ion ajn ĝis ĝi estas oficiale neita! (<http://www.africom.mil/Newsroom/ForTheRecord/10015/letter-to-the-editor-global-research-response>). La nuna timo estas, ke Afriko povus nun rapide fariĝi la nova Vjetnamio. Estas movado 'Resist Africom' [Rezistu Africom], kiu kolektas subskribojn (<http://salsa.democracyinaction.org/o/1552/t/5717/signUp.jsp?key=3094>) (<http://www.resistafricom.org>).

* Sandy Hook: Ĉu estis usona Operacio Gladio?

Ni vere devas scivoli, kiom el tiuj teroristaj atakoj estas kompareblaj kun la operacioj en Eŭrope de Gladio. Ni prenu ekzemple la lastatempan ŝokaĵon ĉe la lernejo Sandy Hook en Newtown, Usono, la 14an de decembro 2012, en kiu 20-jaraĝa Adam Lanza laŭraporte pafis 27 homojn ĉe sia antaŭa lernejo.

Tamen baldaŭ ekaperis nekongruaĵoj en la rakonto. Nick Kollerstrom la 30an de decembro aperigis analizon en sia retejo (<http://terroronthetube.co.uk/2012/12/30/sandy-hook-us-state-fabricated-terror>), kaj samtage Ken O'Keefe, kiu antaŭ nelonge parolis al la grupo '9/11 Keep Talking' pri sia renormaliga laboro por Gazao, afiŝis videon, esprimante sian naŭziĝon pri la okazaĵo, sub titolo 'Sandy Hook False Flag Psy-op - Ken O'Keefe - TJP' [Fals-flaga psikologia operacio Sandy Hook – Ken O'Keefe – TJP] (<http://www.youtube.com/watch?v=ZT-JES3AVj8>).

La 7an de januaro 2013 estis afiŝita en YouTube video titolita 'The Sandy Hook Shooting - Fully Exposed' [La pafado de Sandy Hook – plene malmaskita] (http://www.youtube.com/watch?v=Wx9GxXYKx_8). Ĝi vastiĝis epidemie. Fine de januaro la spektantoj jam atingis 12 milionojn, antaŭ ol dumnokte malsupreniri al 10.5 milionoj. Aperis averto sur la retpaĝo: "La sekvanta enhavo estas identigita de la komunumo de YouTube kiel eventuale ofenda aŭ netaŭga. Ni konsilas prudenton de la spektantoj".

Tiu video, afiŝita de ThinkOutsideTheTV (<http://www.youtube.com/user/ThinkOutsideTheTV>), metas kelkajn tre seriozajn demandojn, kaj montras videaĵojn kiuj dubigas pri la oficiala versio de la okazaĵo. La pretekstistoj por la Establaĵo rapide okupiĝis por ŝajnigi la ideon falsa. En daŭriga video 'Sandy Hook Fully Exposed - OFFICIAL PART 2' [Sandy Hook plene malmaskita – OFICIALA PARTO 2] (http://www.youtube.com/verify_controversy?next_url=/watch%3Fv%3D_nUOBSN03TU), ili raportis pri iom de tiu ŝajnfalsigo, kaj produktis pluan pruvajaĵon.

Sandy Hook estas menciita de Richard Cottrell en intervjuo en la radioprezento de Alex Jones, en kiu li klarigas, kial li opinias, ke Operacio Gladio vivas kaj bonfartas. Li diras pri la historio de Gladio, dirante, ke la ideon de postrestaj armeoj proponis Churchill en la tempo de la Brit-Afrikansa Milito, sed ke ĝi estis poste transprenita de Generalo Lemnitzer, kiu mortigis John F Kennedy, planis la fals-flagan operacion 'Bay of Pigs' en Kubo, kaj provegis mortigi la francan prezidanton Charles de Gaulle. La video, 'Operation Gladio: The Cold War "Black Op" Continues' [Operacio Gladio: La Malvarm-Militaj "Nigraj Operacioj" Daŭras] (http://www.youtube.com/watch?feature=player_embedded&v=wU0fxLS0BSQ) provizas bonegan enkondukon al la temo.

* Kampanjanto kontraŭ SOPA, Aaron Swartz: ĉu estis murdo?

Cetere estis la ŝajna sinmortigo de Aaron Swartz. Laŭ nekrologo en The Guardian: "La ret-programisto kaj kampanjanto por malkaŝaj datumoj Aaron Swartz estis trovita morta en sia novjorka apartamento, ŝajne preninta sian propran vivon je aĝo 26. Swartz faris rimarkindan impreson en la interreto; kiam li estis 12-jaraĝa li verkis sian unuajn seriozajn programojn, kaj je aĝo 13 li gajnis premio ArsDigita pro kreo de nekomerca retejo. Li kunaŭtoris la interretan amaspublikigan normon RSS por distribui blogaĵojn, je aĝo 14, kaj tiam kontribuis al la evoluigo de la kopirajta sistemo Creative Commons de Lawrence Lessig". (<http://www.guardian.co.uk/technology/2013/jan/13/aaron-swartz>). Tio estas nura komenco. The Guardian pli poste raportis, "La 11an de januaro juna usona teknomaniulo nomata Aaron Swartz sinmortigis, kaj la plimulto de la mondo malatentis ... Sed la morto de Swartz venis kiel tondrofrapo en kiberspaco, ĉar tiu freneze talenta, idealisma, kompleksa, bubeto estis ikonulo por ĉio kion ni estimas pri la retumita mondo" (<http://www.guardian.co.uk/technology/2013/jan/20/aaron-swartz-cannon-fodder>).

internet-freedom). Ja, la plimulto de la tradiciaj amaskomunikiloj apenaŭ atentis.

Mi unue aŭdis pri la morto per Russia Today, kiu anoncis, "Aaron Swartz alfrontis eventualan kondamnon de jardekoj en malliberejo, kaj milion-dolaran monpunon pro la asertita ŝtelo de gazetartikoloj kun intenco ili rete afiŝi. Tamen evidentiĝis, ke la posedanto de la retejo, JSTOR, neniel plendis. Unu komenti estis, ke estas kvazaŭ enkarcerigi iun pro akuzo, ke li prunteprenis tro da libroj ĉe la biblioteko (<http://rt.com/news/aaron-swartz-suicide-reddit-858/>). Povus esti, ke la vera kaŭzo de lia persekutiĝo estis lia asociiĝo kun Wikileaks, kiel poste malkaŝis Wikileaks (<http://rt.com/usa/news/wikileaks-aaron-swartz-organization-448/>).

En lia fubebro, lia patro asertis: "Aaron ne sinmortigis, sed estis mortigita de la registaro. Iu, kiu faris la mondon pli bona loko, estis puŝita al sia morto fare de la registaro" (<http://rt.com/usa/news/aaron-swartz-funeral-chicago-059/>) (<http://rt.com/usa/news/aaron-swartz-funeral-chicago-059/>). Verkante en la retejo de Henry Makow la 19an de januaro, Richard Evans demandis, "Ĉu Aaron Swartz estis murdita? Kiam Aaron Swartz rifuzis trakti kun la diablo, ĉu la registaro 'sinmortigis' lin?" (<http://www.henrymakow.com/was-aaron-swartz-murdered.html>). Veterana kampanjanto Gordon Duff diris al la irana Press TV, ke li opinias, ke kanajnlaj elementoj ene de CIA respondecis pri lia murdo (<http://www.presstv.ir/detail/2013/01/19/284445/media-bury-facts-on-us-dissident-death/>). Evidentiĝis, ke alia hakisto, Jonathan James, estis simile persekutita en 2008 de la sama prokuroro, kaj laŭraporte sinmortigis (<http://rt.com/usa/news/swartz-prosecutor-suicide-hacker-050/>). Nun estas klara la simileco kun la afero de la brita armil-inspektisto d-ro David Kelly, kvankam en lia kazo estas forta krimsciencia pruvajlo kiu subtenus murdon.

Estas pri Aaron Swartz io vere inspira. En intervuo titolita 'Aaron Swartz - We Can Change The World', [Aaron Swartz – Ni povas ŝanĝi la mondon] li konkludis: "La unua paŝo por ĉiuj inter la publiko estas kredi, ke vi povas ion atingi" (<http://www.youtube.com/watch?v=JUt5gjqN11w>). Antaŭ nelonge li prelegis pri 'How we stopped SOPA' [Kiel ni ĉesigis SOPA] (<http://www.youtube.com/watch?v=Fgh2dFngFsg>). En tiu li evidentigas profundan komprenon pri la maniero en kiu vere funkcias la mondo, io kion la plimulto de kampanjantoj por sociaj celoj emas ignori. Tiu video estas inkluzivita en ampleksa artikolo en The Daily Mail de la 13a de januaro 2013 (<http://www.dailymail.co.uk/news/article-2261571/Aaron-Swartz-Family-blames-intimidation-MIT-federal-prosecutors-death-weeks-going-trial-hacking-charges.html>).

* Max Keiser kun Alex Jones: Faŝismo jam alvenis

La afero Aaron Swartz estis la ĉefpunkto de tuta elsendo de la 'Raporto de Max Keiser', elsendita en Russia Today, la 22an de januaro, en kiu Max Keiser asertis, ke Usono jam trapasis la sojlon de tiraneco. En la dua duono li intervjuis Alex Jones de Infowars.com, kiu asertis, "Mi ne nepre kredas, ke ili ne fizike mortigis lin". Alex Jones parolis ankaŭ pri sia nun fama intervjuo kun la brita Piers Morgan, kiu, sekve de la incidento de Sandy Hook, kampanjadis en Usono pri la pafil-leĝoj. Temas pri sklaveco kaj tiraneco, asertis Alex Jones. Tiu estis rimarkinda radioelsendo, en tio ke ĝi estis apokalipsa averto al ni ĉiuj en la Okcidento kontraŭ la vastiĝanta Faŝismo, kaj en tiu radioelsendo ne necesas esti financa guroo por ĝin

sekvi (<http://maxkeiser.com/2013/01/22/kr396-keiser-report-threshold-of-tyranny-passed-ft-alex-jones/>). Malgraŭ tio, oni prenas Max Keiser serioze eĉ en BBC. Tri tagojn poste li aperis en la televida prezento de Andrew Neil 'Ĉiutaga Politiko', donante apokalipsan averton pri la stato de la brita ekonomio (<http://maxkeiser1.blogspot.co.uk/>).

Hodiaŭa malbona novaĵo el Usono estas morgaŭa malbona novaĵo por Britio; la afero venas ankaŭ al ni. Luj argumentus, ke ĝi jam alvenis. Faŝismo en Britio embuske sinkaŝas malantaŭ la kulisoj. Ĝi ne estas tiom malkaŝa kaj malkaŝe tiraneca kiel en la Italio de Mussolini, aŭ en nazia Germanio, en tio, ke ili ne malkaŝe mortigas homojn kaj forsendas homojn al koncentrejoj – ĝis nun. Sed iu ajn kiun ne ŝatas la Establaĵo povus finfine trovi sin en Guantanamo Bay, aŭ en simila loko, aŭ eble esti 'sinmortigita'. La afero de armilinspektisto d-ro David Kelly estas evidenta kazo de suspektindaj cirkonstancoj, en kiu la registaro komplicis en la evito de jura mortenketo. Kion alian ni pensu, alie ol, ke ili almenaŭ maskas eventualan kazon de murdo?

Nova dokumentada filmo, 'The Death of Dr Kelly: An Open Case' [La morto de d-ro David Kelly: Nefermita kazo], estis elsendita en la irana televidstacio Press TV la 13an de januaro (<http://www.presstv.ir/doc/aperture.html#The%20Death%20of%20Dr.%20Kelly-An%20Open%20Case>). Tiu donas la fonon kaj kuntekston de la antaŭ-periodo al la iraka milito, kaj ankaŭ intervjuas kernajn spertulojn pri la afero mem.

* La morto de flegistino Jacintha Saldanha : ĉu estis kiel ŝajnis esti?

Kaj plue estas la stranga afero de flegistino Jacintha Saldanha, kiu laŭraporte sinmortigis post kiam ŝi akceptis telefonvokon de du aŭstraliaj radio-ŝercemuloj pozantaj kiel la reĝino kaj Princo Charles, demandante pri Kate Middleton (la Dukino de Kembriĝo) ĉe la hospitalo King Henry VII (<http://www.heavy.com/news/2012/12/jacintha-saldanha-kate-middleton-prank-call-suicide-dj/>). Ĉu tio sufiĉus por puŝi iun preter la klif-randon, elektante hororan manieron tion fari, ĝismorte strangoliĝante? La rezulton de la postmorta ekzameno oni atendis esti anoncita la 13an de decembro 2012 (<http://www.dailyrecord.co.uk/news/uk-world-news/post-mortem-result-of-hoax-call-victim-1486170>) (<http://metro.co.uk/2012/12/12/jacintha-saldanha-post-mortem-results-due-3313258/>), sed tiam, la 13an de decembro, parlamentano Keith Vaz asertis, ke la rezulton oni sendos al la familio kvar tagojn poste (<http://www.telegraph.co.uk/news/uknews/9742422/Keith-Vaz-Jacintha-Saldanhas-family-await-post-mortem-report.html>), kaj tiam la rezulto estis tenota sekreta ĝis la daŭrigo de la mortenketo la 29an de marto. Kial? La familio metis al la instancoj sesdek demandojn, el kiuj kvarde estis al la hospitalo King Edward VII, sed ili ricevis neniujn respondojn (<http://www.indianexpress.com/news/family-of-hoax-call-nurse-jacintha-saldanha-ask-60-questions-get-no-answers/1058822/0>). En mondo en kiu la instancoj ne estu fidataj, la homoj pravus esti suspektemaj.

Ĉu la morto de flegistino Saldanha estis tia kia ĝi ŝajnis esti, aŭ ĉu ŝi sciis ion kion ŝi ne devus scii? Du membroj de nia grupo '9/11 Keep Talking' komencis scivolemi pri tio, kaj unu el ili elfosis televidelsendon de BBC en la serio Panorama la 20an de septembro 1999, titolitan 'Private Risks' [Privataj Riskoj], en kiu unu eŭropa parlamentano Emma Nicholson, kies edzo, Sir Michael Caine, mortis

post kuraco ĉe la prestiĝa hospitalo King Edward VII uzata de la reĝina patrino, diras pri sia ŝokiĝo pro la malsperta stabo tie. Laŭ Panorama, Privataj hospitaloj traktas kun 850 000 pacienoj en Britio ĉiujare, sed ili tute ne estas jure registritaj kaj kontrolataj kiel hospitaloj. Ili estas registritaj kiel fleg-hejmoj. ... D-ro Carl Waldemann, membro de la societo 'Council of the Intensive Care' [Konsilio por Intensa Kuraco] diras al Panorama, ke la probable ke Sir Michael Caine mortus estus 'minimumaj' se la stabo estus dece trejnita (<http://news.bbc.co.uk/1/hi/programmes/panorama/archive/450689.stm>). La hospitalo King Henry VII estas ankaŭ militserva hospitalo. Brian Gerrish estas eksa militservisto, kiu plenumis ampleksan esploron pri Common Purpose [Komuna Celo]. En lastatempa prelego li enigme asertis, "Do, sciu, en la nuna momento, Afganio kaj Irako estas fundamente – estis – kolbasmaŝino por krei vunditojn, kaj mi opinias, ke ili deziras havi kelkajn el tiuj vunditoj, ĉar mi opinias, ke ili uzas la vunditojn por eksperimentoj pri pretetiko" (Brian Gerrish: 'Savile and the Mindbending Changeagents of Westminster' - Brian Gerrish' - at 43:50) (<http://www.youtube.com/watch?v=Jmtp74vof5Q>). Mi interesiĝus scii, sur kio li tion bazas.

* 911-militoj: pluaj paŝoj al novaj nurembergaj procesoj

La ikona evento kiu ekis la veromovadon estis kompreneble 9-11. La Internacia Tribunalo pri la Okazaĵoj de la 11a de Septembro 2001 okazis dum la deka datreveno de la atakoj de 9-11 ĉe la universitato Ryerson, en Toronto, Kanado, je la 8a ĝis la 11a de septembro 2011. La DVD kiu kronikas la konferencajn aktivecojn, titolita 'The Toronto Hearings on 9/11: Uncovering Ten Years of Deception' [La Toronto-Tribunalo pri 9-11: Malkaŝante dek jarojn da trompado] estis publikigita en aprilo 2012, kaj inkluzivas pli ol kvin horojn da multimedia atestaĵo. Tiu haveblas de la retejo de ' Architects and Engineers for 9/11 Truth' [Arĥitektoj kaj Inĝenieroj por 911-vero]. Nun haveblas la oficiala raporto pri la tribunalo. Ĝi nomiĝas 'The 9/11 Toronto Report' [La Toronto-Raporto pri 9-11] (<http://www.ae911truth.org/en/news-section/41-articles/697-the-toronto-hearings-report-now-available.html>).

La raporto konkludas, ke la 911-atakaj estis 'krimoj kontraŭ la homaron", ke necesas identigi kaj sekvi la maskad-krimojn, kaj ke la oficialaj raportoj ne provizis kontentigan klarigon pri la okazaĵoj. Tio estas promesplena kiel kerna dokumento en la premado por la vero pri 9-11. La tribunalo havas nenian juran statuson, sed ĝi havas la statuson de scienca konferenco, kaj povus esti influa en la starigo de iuspeca jura proceso.

En Malajzio, estis fondita de antaŭa malajzisia ĉefministro Mahathir Mohamad tribunalo konata kiel 'The Kuala Lumpur War Crimes Commission (KLWCC)' [La Milit-Krima Komisiono de Kuala Lumpur (KLWCC)] (<http://mathaba.net/news/?x=630223>). Tion oni vidis kiel alternativon al la Internacia Krim-Kortumo en Hago, kiun Mahathir akuzis pri unflankeco en sia elekto de kazoj por pritrakti (https://en.wikipedia.org/wiki/Kuala_Lumpur_War_Crimes_Commission). La 22an de novembro 2011, sekve de kvartaga traktado, KLWCC trovis George W Bush kaj Anthony L Blair kulpaj pri militkrimoj rilate al la invado de Irako en 2003 (<http://exopolitics.blogs.com/files/extempore-judgment-of-the-kl-war-crimes-tribunal.pdf>). Pri tio raportis Global Research (<http://www.globalresearch.ca/chief-prosecutor-of-the-kuala-lumpur-war-crimes-commission-v-george-w-bush-anthony-l-blair/27821>), Al Jazeera (<http://www.aljazeera.com/indepth/opinion/2011/11/20111128105712109215.html>) kaj Press TV

(<http://presstv.com/detail/211548.html>). La 12an de majo 2012 la sama tribunalo trovis George W Bush kaj asociulojn kulpaj pri torturo (<http://www.globalresearch.ca/bush-and-associates-found-guilty-of-torture/31558>). Mi opinias, ke estus bona ideo, ke iu formale prezentu pruvojn al KIWCC kontraŭ George W Bush kaj Anthony L Blair, provizante la Toronto-Raporton kiel pruvojn pri militkrimoj rilate al 9-11.

Pri la verdikto de KIWCC mi unue sciigis en miriga 16-paĝa artikolo en germana katolika magazino nomata 'Komma', kiun enmanigis al mi amiko en novjara evento en Germanio. Ĝi titoligis 'Meinungsmanipulation: Was uns die Massenmedien verschweigen' [Pensomanipulado: Kion la amaskomunikiloj tenas for de ni], kaj ĝin verkis profesoro Michael Friedrich Vogt, iama profesoro pri Publikaj Rilatoj. Ĝi priskribis multajn aferojn en kiuj la gazetaro kaŝis la veron for de la publiko, kaj unuarange venis 9-11 kun priskribo de la veromovado.

La parto kiu kaptis mian atenton tekstis: "Turnante nin al Malajzio – ankaŭ tiun raporton ne portis la tradiciaj amaskomunikiloj: Bush kaj Blair trovitaj kulpaj de militkrimoj. La loka (kaj ĝis nun la unua) krim-proceso kontraŭ antaŭa usona Prezidento George W Bush kaj antaŭa brita ĉefministro Tony Blair antaŭ la Milit-Krima Komisiono de Kuala Lumpur (KIWCC) pro militkrimoj en Irako finiĝis per verdikto de 'kulpa' kontraŭ la akuzitoj. Bush kaj Blair nun estas metitaj en oficialan liston de bezonata krimuloj.

"Fine, la juĝistoj decidis, ke kiel respondecaj ŝtatestroj, Bush kaj Blair kulpis pri plenumo de Ago de Agresso kontraŭ la komun-juraj rajtoj, per trompado kaj per misuzo kaj selekta manipulado de internacia juro, tiu Ago de Agresso kondukinta finfine al la amasmurdo inter la populacio de Irako. Kie oni legas tion en la tradicia gazetaro?"

* Io malĝustas – kaj ĉio dependas de mi!

"Ĉu iam vi sentas, kvazaŭ estas io horore malĝusta? Kelkfoje eble vi pensas, ke ĉio estas en via menso?" demandas la retejo 'Know the Lies' [Konu la mensogojn], " ... Se ĝi SENTA malĝusta ... plejverŝajne ĝi ESTAS malĝusta" (<http://knowthelies.com/about>). David Icke produktis mallongan videon, en kiu li petegas al ĉiuj elparoli. Ĝi nomiĝas 'David Icke - the Bystander effect - It's all.. ME...ME...ME!' [David Icke – la Apudstara efiko – Ĉio temas pri MI ... MI ... MI!]. Li diras, ke se ni plu diras 'Mi, mi mi', ni "donas ĝuste la necesan 'dividu kaj regu' ..." (<https://www.youtube.com/watch?v=wTsSKdcQvoU>). Mi havas sur miaj librobretoj ankaŭ historian romanon nomatan 'Kvazaŭ ĉio dependus de mi' (<http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=8249>). Kia bona slogano! Ju pli ordinaruloj tutsimple daŭrigas la paroladon pri amas-trompoj kiuj plenumiĝas nianome, des pli ili donas protekton al malmaskantoj kaj aliaj, kiuj alprenas gvidajn rolojn en la malmasko de tiaj aferoj en nia socio.

Do bonvolu ja daŭrigi la paroladon.

Salutas Ian
ian@fantom.org.uk

Berkshire 9/11 Truth

<http://www.berkshire911truth.org.uk> (retestro: David Bowman)

<http://berkshire911truth.blogspot.com/> (novaĵletoj: Ian Fantom)



Disdivido de Kosovo aŭ de Serbio

La ideo pri la disdivido de Kosovo estis delonge fiksita en la menso de la serbaj naciistoj, en ĉiuj konferencoj kaj kunvenoj pri Kosovo, ekde Rambujeo ĝis hodiaŭ.

Tamen, serboj neniam volis publikigi tian ideon. Kial? Ĉar tiu kiu pretendas pri la disdivido de Kosovo, aŭtomate atestas ke ĝi (Kosovo) ne estas sia.

Post la foriro de la serbaj koloniismaj fortoj disde Kosovo en la jaro 1999 kaj post la proklamo de ties sendependeco, Belgrado komprenis definitive ke ĝi jam perdis Kosovon porĉiame. Sekve, la ideojn pri la ties disdivido ĝi komencis konfirmi ĉiam pli ofte kaj ĉiam pli malkaŝe.

La eksa prezidento de Serbio, Boris Tadiĉ ofte ripetis sian refrenon:

“Ne estas bone ke al unu flanko oni plenumu ĉiujn postulojn, dum al la alia nenion. Ne estas bone ke unu flanko ricevu ĉion, dum la alia restu kun malplenaj manoj”.

Tiu diraĵo de B. Tadiĉ estis ja rekta propono por la disdivido de Kosovo. Finfine, unu el la ministroj de la serba registaro- Ivica Daĉiĉ (nun ĉefministro), kelkfoje starigis publike la demandon de Belgrado pri la disdivido de Kosovo. La prepozicio:

“Ankaŭ ni serboj devas ĉerpi ion el Kosovo”.

Fariĝis refreno de Tomislav Nikoliĉ kaj Ivica Daĉiĉ. Ĉi tiuj pensas ke la historiaj teritorioj, loĝataj de la etnaj kaj aŭtoktonaj popoloj, estas varo por la merkato.

Aldonendas ke serboj aperigis ankaŭ alian ideon:

“La konversacioj pri la disdivido de Kosovo okazu inter Albanio kaj Serbio”.

Ĉar serboj postulas la disdividon de Kosovo, aŭtomate tio atestas ke Kosovo ne estas ilia. Oni povas aŭkcii nur varon kiu ne estas via.

Ĝis hodiaŭ, kiam temis pri Kosovo, la serbaj aŭtoritatoj referiĝis al Konstitucio de Serbio, laŭ kiu Kosovo estis sia parto.

Ĉar hodiaŭ, ankaŭ la serbaj ministroj, inkluzive la registarestro, publike aperas per la ideo pri la disdivido de Kosovo, oni starigas la demandon:

Kio okazis al la serba konstitucio, laŭ kiu Kosovo estas parto de Serbio?!

Alivorte, serboj, kiam ili volas pluregu la neserbajn teritoriojn, referiĝas al la konstitucio kaj vice-versa; kiam al ili konvenas io alia, neniel hezitas preterpasi sian konstitucion.

* * *

EU devas prikonsideri la fakton ke Kosovo, samkiel kiu ajn alia ŝtato de la kontinento, krom la ŝtaformiga plimulta popolo, enhavas ankaŭ kelkajn etnajn malplimultojn. De ĉi tie rezultiĝas ke la aparta traktado de la serba malplimulto en Kosovo, kontraŭstaras al la okcidentaj principoj pri la malplimultoj. La disiĝo de parto de Kosovo, ekkreas Kosovon pure etnan, kio kontraŭstaras al la eŭropecaj standardoj pri la malplimultoj.

EU devas prikonsideri la fakton ke la serbaj malplimultoj en kelkaj el la eksaj respublikoj de Jugoslavio, ne estas la solaj vivantaj ekster la patrino-Serbio.

Albanoj vivas en ses ŝtatoj de la regiono: en Albanio, en Kosovo, en Orienta Kosovo (Presheve, Bujanovc, Medvegje), en Makedonio, en Montenegro kaj en Grekio.

Se la serboj de la nordo de Kosovo demandas disiĝi de Kosovo por ke aliĝu al Serbio, tiam la samon demandus:

Albanoj de la Orienta Kosovo

Albanoj de Makedonio

Albanoj de Montenegro

Albanoj de Grekio

La disdivido de Kosovo determinus ankaŭ la disdividon de Makedonio inter Albanio kaj Bulgario. Alivorte, ĝi solviĝus kiel sapo ŝaumo kaj malaperus de la geografia kaj politika mapoj de Balkanio.

Tamen Serbio ne tiom zorgas pri la eventualaj sekvaĵoj de amputiĝo de parto de Kosovo. Belgrado deziras tumultojn kaj perturbojn. La nehistoriaj ideologioj nutriĝas per malbono.

Kiel vidite, per la disdivido de Kosovo malfermiĝus la Pandora Kesto kaj kaŭziĝus la Efekto Domino . La efekto domino ampleksus ĉiujn ŝtatojn de la regiono, ĉar ĉie estas malplimultoj, etnaj grupoj kaj minoritatoj.

Naciaj malplimultoj estas en ĉiu ŝtato de la Duoninsulo:

turkoj- en Bulgario; hungaroj- en Rumanio; en Vojevodio (Serbio), en Slovakio, en Kroatio; bosniaj muslimoj- en Sandĵako de Serbio kaj Montenegro; slavofona etna grupo- en Grekio; kroatoj- en Bosnio-Hercegovinio kaj en Vojevodio; serboj- en Kroatio kaj Serba Respubliko de Bosnio-Hercegovinio.

En la jaro 1920, Hungario perdis dutrionojn de sia teritorio, dum hodiaŭ, unu triono de la hungara nacio vivas ekster la patrina lando- Hungario.

En ĉiu lando de la regiono estas ankaŭ:

romoj, vlahoj (arumanoj, cincaroj), hebreoj, egiptoj, la etna grupo je islama religio parolanta slavajn lingvojn (en diversaj landoj aperas per diversaj nomoj).

Laŭ la britaj donitaĵoj, en Turkio estas pli ol 14 milionoj da kurdoj.

Serboj volas ke la privilegio de la aliĝo al la patrina lando apartenu nur al ili kaj al neniu alia en la regiono. El ĉi tiu vidpunkto, EU ne devas dorloti Serbion.

Tion kion Serbio postulas por si, ĝi malpermesas al la etnaj komunumoj sub ties regado. Ekzemple, malpermesas la disiĝon al:

Albanoj de la Orienta Kosovo (Presheve, Bujanovs, Medvegje);

Muslimoj de Sandĵak;

Hungaroj de Vojevodio;

Bulgaroj sudoriente de Serbio.

Sandĵak estas regiono administrata de Serbio. Laŭ la registriĝo de la jaro 2003, aplikita de Belgrado, tie loĝas ĉirkaŭ 235 000 homoj. El ili, 134 000 estas bosnianoj (muslimoj), konsistigantaj 56 % de la

loĝantaro kaj 89 000 serboj, konsistigantaj 37 % de la loĝantaro; 8 000 muslimoj, konsistigantaj 4 % de la loĝantaro. La entuta nombro de bosnianoj (muslimoj) kaj de tiuj sin deklarintaj muslimoj (kiel naciecon) estas 142 000, konsistiganta 60 % de la regiono de Sandĵak.

Ĉi tiuj serbaj donitaĵoj pri la strukturo de la loĝantaro de Sandĵako ne koincidas al la realo. Alivorte la procento de la nesperba loĝantaro en ĉi tiu regiono, estas pli granda.

Vojevodio estas regiono sum la Serbia regado. En ĝi vivas 26 minoritatoj, inkluzive ankaŭ hungarojn. Laŭ la registriĝo de la loĝantaro plenumita de Belgrado en la jaro 2011, en Vojevodio vivas pli ol 251 000 hungaroj, konsistigantaj 13 % de la ĝenerala loĝantaro de tiu regiono.

Ekde la jaro 1945 ĝis hodiaŭ, Serbio sekvis, rilate hungarojn, la politikon de sennaciigo. Ĝi tentis per la serbaj kaj montenegraj koloniantoj ŝanĝi la etnan strukturon de la regiona loĝantaro. Sekve, la nombro de la hungaroj en Vojevodio estas pli granda ol tio rezultinta el la oficiala registriĝo fare de Belgrado.

Fine de la jaro 1944 kaj komence de la jaro 1945, multaj hungaroj de Vojevodio, sub la serba premo, estis devigitaj foriri de siaj teroj, dum multaj aliaj, pro akuzo pri kolaboracionismo kun la germana armeo- estis ekzekutitaj.

La forpelo de germanoj de Danubo disde Vojevodio

Antaŭ la Dua Mondmilito en Vojevodio estis 350 000 germanoj, nomataj germanoj de Danubo. La reala nombro ilia estis pli granda. Dum la periodo oktobro 1944- majo 1945, konata kiel "sanguma aŭtuno", pro la akuzo de kolaboracionismo kun la germana armeo, Serbio aplikis la etnan purigadon de Vojevodio, forpelante de ĉi tiu regiono pli ol 250 000 civilajn germanojn. Ĉi tiuj estis devigitaj foriri kune kun la germana armeo retiriĝanta.

Kontraŭ la etnaj germanoj de Vojevodio, serboj ekzercadis raprezaliojn, forprenis de ili la ŝtatanecon, konfiskis la proprietaĵojn. En ties domoj instaligis serbaj, montenegranaj kaj makedonaj koloniantoj. La donitaĵoj montras ke en la jaroj 1944-1945, en Jugoslavio, ĉefe en Vojevodio, serboj mortigis 56 000 civilajn germanojn. En la serbaj prizonoj, dum la supre menciita periodo, mortis pro malsato, pro malsanoj kaj pro malvarmo 48 447 civilaj germanoj.

Multajn germanojn de Vojevodio, serboj enmanigis al la Ruĝa Armeo sovietia, kiujn tuje oni deportadis en Siberion, kie kiel militkaptitojn ili laboris en la minaj kampoj. Neniu el ili revenis viva.

La saman dramon travivis miloj da hungaroj el Vojevodio.

Forpelante la germanojn de Danubo, ekzekutante ilin, kaŭzante morton en la fifamaj prizonoj kaj enmanigante al sovietianoj (rusoj) por depordadi al Siberio, serboj sukcesis ŝanĝi la etnan enhavon de Vojevodio.

Neniu el la neserbaj etnaj komunumoj vivantaj sub la serba regado, kiel albanoj de la Orienta Kosovo, muslimoj de Sandĵako kaj hungaroj de Vojevodio, ne sentas Sebion kiel sian ŝtaton. Kontraŭe, sin sentas kiel sub okupacion.

La orienta Kosovo (tri albanaj municipoj), same la regiono de Sandĵako, regataj de Belgrado, estas ja plej malevoluintaj kaj postrestintaj regionoj de Serbio. Serbio, en ĉi tiuj du regionoj, neniam investis ion. Sekve, en ĉi tiuj du regionoj dominantas larĝskale senlaboreco. Rilate ilin, Belgrado aplikas silentan politikon de la etna purigado kaj ekzercas genocidon.

Sekve de la ekstrema ekonomia postrestanteco, la loĝantoj de ĉi tiuj du regionoj apenaŭ estas integriĝintaj en la ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj procesoj. Ĉi tiujn du regionojn, Serbio estas transforminta en getoojn. La loĝantoj de ĉi tiuj regionoj, sian perspektivon vidas en elmigrado: albanoj-al Okcidento, dum muslimoj de Sandĵako al Turkio.

La getoizado de la Orienta Kosovo kaj de Sandĵako estas evidenta spegulo de la serba politiko pri la nacia egaleco.

Kiam EU diras ke la azildemandantoj alvenas el Serbio kaj Makedonio, oni subkomprenas ke ili alvenas ne el la propra Serbio aŭ Makedonio, sed el Presheva, Bujanovc, Medvegje, samkiel el la albanaj teroj en Makedonio.

Danke al la ekstrema senlaboreco, Belgardo kaj Skopje faras la etnan purigadon de la Valo de Presheva kaj de la nordokcidentaj partoj de Makedonio.

Krome, por ŝtopigi kiun ajn demandon de la albanoj de la Orienta Kosovo, Serbio estas koncentrinta en tiu regiono grandan armean forton.

EU devas altrudi al Serbio ian Planon de Ahtissari, kiu garantius ekskludajn rajtojn al la albanoj de la Orienta Kosovo (tri albanaj municipoj), same al la muslimoj de Sandĵako.

Sur kiu bazo Serbio postulas por si mem tion kion ĝi ne agnoskas al la aliauloj?! Surbaze de la forto?! Kaj vidu la hipokritecon, ruzecon kaj trompecon! Unuflanke Belgrado, senĉese deklaras ke “ĝi aliros al la Nordkosova afero pacmaniere”, aliflanke, la pacan aliron apogas tute sur la forto. Kia paradokso! Ĉu EU devas permesi tian kontraŭdiron ruzan?

Belgrado strebas disigi de Kosovo la loĝatajn partojn el 5 % da serboj. Tiam, oni starigas la demandon: Kiamaniere ĝi rekompencos kaj justigos la serban ekspluatadon de Kosovo- de la teroj loĝataj de albanoj- ekde la okupacio en la jaro 1912 ĝis la jaro 1999?

La internaciaj politikaj centroj de la decidpovo- Vaŝingtono kaj Bruselo, devas sciigi al Belgrado, ke antaŭ ol la disdivido de Kosovo, oni devas esti la disdividon, malkomponigon kaj fragmentigon de Serbio. Eudo, ne devas pluteni la Grandan Serbion, sed devas sciigi al Belgrado ke la proceso de malkomponigo kaj fragmentigo de la Garaŝanina Serbio povas komenciĝi en ĉiu momento.

El Serbio devas disiĝi:

La orienta Kosovo (tri albanaj municipoj),

-Vojevodio kaj

Sandĵako (loĝata de muslimoj).

La serba dukriteria politiko

Serbio estas unu el la raraj ŝtatoj enmondo, se ne la sola, kiu postulas por si mem tion kion ĝi ne agnoskas al la aliuloj. Serbio estas la sola ŝtato de la globo, kiu por sia minoritato ekster Serbio postulas tion kion ĝi ne agnoskas al la albanoj de la Orienta Kosovo, al muslimoj de Sandĵako kaj hungaroj de Vojevodio.

Belgrado, por manpleno da serboj de Kosovo, postulas aŭtonomion, t.e. ŝtaton ene de la ŝtato, dume al la albanoj de la Orienta Kosovo, al la muslimoj de Sandĵako kaj al la hungaroj de Vojevodio, sekvas politikon de sennaciigo, marginizado kaj getoizado, instigante ankaŭ ties elmigradon el iliaj historiaj teroj.

La Granda Serbio de radikaluloj kaj socialistoj grandserbismaj celas instali en Kosovo malgrandan Serbion. Belgrado postulas por la serboj de Kosovo, kiel tranzitoran fazon, ke iutage, la aŭtonomaj partoj disiĝu kaj aliĝu al Serbio. Esence, per tio subkompreniĝas la disdivido de Kosovo, plenumota malrekte.

La Orienta Kosovo (tri albanaj municipoj) estas strategia zono, ĉar tra ĝi pasas la Deko Koridoro konektanta Serbion kun Grekio, kun Egeo kaj Mediteraneo.

Koncerne al la integreco de la teroj de Kosovo, distinge de certaj landoj de Eŭropo kiuj estas ne decidemaj, Usono kaj Germanio jam deklaris striktan sintenon:

“La teritoria integreco de Kosovo estas netuŝebla”.

Xhelal Zeneĵi

La mondo naskiĝis kun muziko

Paiva Netto



José de Paiva Netto*, ĵurnalisto, radkronikisto kaj verkisto. Li estas direktoro-prezidanto de LBV.

Se oni pensas pri tio, dum kiuj tempoperiodoj muziko grave manifestiĝas laŭ la epokoj, ni povas konkludi, ke ĝi ekzistas de antaŭ la tempoj. Efektive, ĝi estas ilo por tiu granda ĉefverko de la Ĉiela Patro, nome la Universo.

Kiam oni legas la komencajn ĉapitrojn de la Genezo de Moseo, tiam oni sentas la fortan harmonion, kiu naskiĝis el la ekapero de riveroj, de arboj, de bestoj, de la apartiĝo de teroj, de la etendiĝo de maroj kaj de la formiĝo mem de nia eterna Spirito.

Sekve de tio, estas eble trovi diversajn kaj signifoplenajn momentojn, kiam muziko kongruas kun la historio de multaj civilizacioj kaj pensofluo, kiuj vivigas la Teron. (...) Bona muziko estas ia nerompebla ligilo, kiu kunigas la kreiton al la Kreanto.

Fronte al tio, oni havas la precizan ideon, ke la pulsado de Vivo, Bono, Solidareco, Respekto kaj Karitateco estas ankaŭ melodioj, sonoj, ritmoj, kiuj harmoniigas niajn pensojn, vortojn kaj agojn per la vibrado de Justeco kaj Amo.

DIO EN ĈIU HOMO

Mi kaptas la okazon por danki por la korespondaĵo, kiun mi ricevis de profesorino Adriane Schirmer, el San Paŭlo, Brazilo, per kiu ŝi komentas mian modestan muzikverkaron: "Mi emas gratuli vin pro viaj melodioj. Ili profunde tuŝas nian Animon kaj vekas en ni plej bonajn sentojn. Ili valoras kiel petego, kiel preĝo al la Ĉiela Patro. Kiam ni ilin sonigas, ni sentas, kiel en momentoj de preĝado, puran koron. Kaj kiam tio okazas, tiam ni vidas Dion en ĉiu homo, en ĉiu planto, en ĉiu sunsubiro... Tiam, kun pura koro kaj surgenuiĝinta Animo, ni fariĝas kapablaj kompreni amon sen postuloj, amon per la Amo de Jesuo".

Foto: Vinícius Bueno



Rubem Alves

MUZIKO KAJ MEDICINO

Dankon, legantino Adriane, interalie pro tio, ke vi sendis al mi la belan tekston, kiu prezentas la verkon “La Kuracisto”, de mia amiko Rubem Alves, intelektulo, teologiisto kaj eĉ eksposedanto de restoracio. Li estas multvalora brazilano.

“Muzikiloj ekzistas ne pro si mem, sed pro la muziko, kiun ili povas produkti. En ĉiu muzikilo ekzistas senfina kvanto da dormantaj melodioj, atendantaj, ke iu veku ilin. Kiam ili vekigās, kaj oni aŭskultas ilian muzikon, tiam okazas Beleco, kaj kun Beleco, ĝojo. La korpo estas ia delikata muzikinstrumento. Necesas zorgi pri ĝi, por ke produktu muzikon. Por tio, ekzistas amaso da medicinrimedoj. Kaj multaj el tiuj estas efikaj. Sed la korpo, tiu stranga instrumento, ne resaniĝas nur per tio, kion oni faras por ĝi medicinare. Ĝi bezonas ensorbi sian propran muzikon. Muziko estas resanigilo. Se la muziko de la korpo estas malbela, ĝi ekmalĝojas — ĝi eble eĉ ĉesos deziri plu vivadi. Sed se la muziko estas bela, ĝi sentas ĝojon kaj emas vivi. En pasinta tempo, kuracistoj kaj flegistinoj tion sciis. Ili zorgis pri medikamentoj kaj korpaj intervenoj — taŭgaj por la korpo — sed ne forgesis bruligi la misteran flamon de ĝojo. Sed ĉi tiun flamon oni ne bruligas per ĥemiaĵoj. Ĝi ekbrulas magie. Ĝi bezonas voĉon, aŭskultadon, rigardadon, tuŝojn, rideton. Kuracistoj kaj flegistinoj: samtempe teknikistoj kaj magiistoj, al kiuj oni donis la mision ripari muzikilojn kaj veki en ili la emon vivadi...”

Jen do mi lasas ĉi tie mian omaĝon al bonaj muzikistoj, bonaj kreantoj de muzikiloj, kaj kompreneble al bonaj kuracistoj kaj flegistinoj.

*José de Paiva Netto, verkisto, ĵurnalisto, radikomunikanto, komponisto kaj poeto, naskiĝis je la 2-a de marto 1941, en Rio-de-Janeiro, RJ, Brazilo. Li estas Direktoro-Prezidanto de Legio de Bona Volo (LBV), aktiva membro de Brazila Asocio de Amaskomunikiloj (ABI), de Brazila Asocio de Internaciaj

Amaskomunikiloj (ABI Inter), de Nacia Federacio de Ĵurnalistoj (Fenaj), de International Federation of Journalists (IFJ), de Beletra Akademio en Centra Brazilo, de Sindikato de Profesiaj Ĵurnalistoj en Subŝtato Rio-de-Ĵanejro, de Sindikato de Verkistoj en Rio-de-Ĵanejro, de Sindikato de Radikomunikistoj en Rio-de-Ĵanejro kaj de Brazila Unuiĝo de Komponistoj (UBC).

Viando



"Viando estas peco da vivoforto". Tion asertas konata slogano. Ĉu tio vere validas? Aŭ ĉu ni tamen povas vivi sen viando? La faktoj parolas klaran lingvon.

Se eĉ malgraŭ la diversaj skandaloj kiel BSE aŭ duone putriĝinta viando la nombro da vegetaranoj apenaŭ kreskas, plej multaj homoj tamen ankoraŭ sentas grandan emon pri viando. Jam nur la germanoj manĝas apenaŭ 60 kilogramojn da kolbaso kaj viando pokape kaj pojare, kaj en Usono estas eĉ 30 kilogramoj pli. Tio starigas la demandon: Ĉu estas kutimo aŭ ruza merkatika agado kiu manipulas nin al manĝado de viando? Aŭ ĉu ni simple el biologia vidpunkto ne kapablas alimaniere nutri nin, ĉar nia korpo de ĉiam bezonas la viandajn nutraĵojn?

Ke la homo de sia origino estas viandomanĝanto, tio apenaŭ estas pridubebla. Esploristoj skanis per laseraj radioj la mueldentojn de la homa specio Australopithecus kiu estas la plej antikva hominido kaj konstatis ke niaj antaŭuloj evidente havis larĝan menuon el folioj, fruktoj, semoj, radikoj, tuberoj - kaj viando. Tio tamen estis rezulto de evoluo kiu komenciĝis per manĝado de fruktoj.

Nome la fruktoj liveris simplajn karbonhidratojn por kies digestado sufiĉis mallonga digesta trairejo kun nur unu stomaka ĉambro - kaj ĉi tiu mallonga versio taŭgis ankaŭ por la konsumo de viando kiu ja ne tro longe restu en varma korpo ĉar ĝi rapide putriĝas. La kapablo digesti malmolfibran legomon dum tio ja perdiĝis - kion ni povas konfirmi post konsumo de cepoj aŭ de brasiko kiam ni sentas aerpremon en la ventro - sed anstataŭ tio la frua homo havis nun alternativon precipe dum periodoj de sekeco kiam disponeblis nur malmulte da fruktoj.

Krome la viando ofertis fonton de proteino kiu verŝajne akcelis la kreskadon de la cerbo ĝis ĝia hodiaŭa grandeco. Sen la bestaj proteinoj eble la homo ne estus povinta evolui al "Homo sapiens" kun siaj unikaj raciaj fortoj.

Tio ne devige signifas ke ni en la hodiaŭa socio de bonfarto kun ĝia abunda oferto de nutraĵoj ankoraŭ bezonas viandon. Ja nia digesta aparato povas tre bone prilabori la bestajn proteinojn, ĉar la strukturoj de iliaj aminoacidoj similas al niaj. Sed per kombino el ovoj, laktaj produktoj kaj vegetaraj nutraĵoj - ekzemple terpomoj kaj freŝa fromaĝo aŭ ovoj kaj sojo - ni estas provizataj per proteinoj kiuj ne nur similas rilate al digesta utilo al la viando, sed eĉ superas ĝin. Nia asimilada sistemo eĉ pli facile povas prilabori ilin.

Viando do ne nepre necesas por nutri nin. Sed ĝi ankaŭ ne damaĝas al ni se ni manĝas neprilaboritan viandon. Do ekzemple kolbaso ja havas damaĝan efikon. Mia kuracisto tial ankaŭ antaŭ tri jaroj rekomendis al mi rezigni pri la konsumo de kolbasoj kaj manĝi anstataŭe boligitan ŝinkon. En la prilaborita viando estas multaj saloj kiuj atakas la sanon.

Do kiu manĝas neprilaboritan viandon prefere el ekologia bredado kaj elektas inter diversaj viandoj, tiu ne ricevos problemojn kun sia sano. Kaj senviandaj tagoj en tiu kazo ankaŭ utilas. Ĉar kiel liveranto de nutraĵoj viando intertempe ne plu nepre estas bezonata.

(Ĉerpita de Brazilo)

Kio allogus vin en Albanio?

Sudokcidente de Eŭropo, inter Italio kaj Grekio troviĝas malgranda lando, kiu sendependiĝis nur 100 jarojn antaŭe.

La popolo parolas tute apartan lingvon negrekan kaj nelatinan kvankam la kulturo estas ne malpli praa ol la ties du menciitaj grandaj civilizoj.

La landon karakterizas altaj montoj ĉirkaŭ 3000 metroj kiuj formas Albanajn Alpojn kaj vastaj ebenaĵoj jen 800 metrojn jen kelkajn metrojn super la marnivelo kie oni kultivas cerealojn kaj aliajn vegetaĵojn. Du mediteraneaj maroj, Adriatika kaj Jonia, limigas ĝin laŭlonge de kelkcentoj da kilometroj formantaj belegajn golfojn, plaĝojn kaj lagunojn kiuj allogis lastajn jarojn milionojn da turistoj el diversaj landoj.

Pro longa politika izoliteco disde la cetera mondo la naturo plurestis iom virga kaj pura. Ankaŭ la homoj estas sinceraj, fidelaj, gastamaj kaj komuniĝemaj.

Albanion oni povas atingi nun plej facile per surtera, surmara aŭ aera veturiloj en plurdekoj da enirpunktoj sen ia problemo de vizo, pago aŭ diskriminacio.

Sed unue klaku sur interreto "Albanio", "Turismo en Albanio", "Albana lingvo", "Albana naturo" ktp kaj vi trovos pli multe da informacio.

Bonvenon al nia lando, naskiĝloko de Patrino Tereza, legendeca generalo Skanderbeg, imperiestroj Kostandino la Granda, Justiniano la Unua, Sankta Jeronimo kaj multaj aliaj famuloj.

Matilda Sokoli

La Rakonto de la Aglo

estas albana popola fabelo kiu klarigas kiel Albanio kaj Albanoj ricevis ilian indiĝenan nomon:

Junulo ĉasis en la montoj. Aglo fluganta super li alteriĝis aldone al roko. La aglo estis aparte granda kaj havis serpenton en ĝia beko. Post tempeto, la aglo flugis foren de la roko kie ĝi havis ĝian neston. La junulo tiam grimpis al la pinto de la roko kie li vidis, en la nesto, aglidon ludantan kun la mortinta serpento. Sed la serpento ne estis vere mortinta! Subite ĝi moviĝis, rivelis ĝiajn dentegojn kaj estis preta trapiki la aglidon kun ĝia mortiga veneno. La junulo rapide prenis sian arkon kaj sagon kaj senvivigis la serpenton. Tiam li prenis la aglidon kaj komencis por lia hejmo. Subite la junulo aŭdis supra lin la laŭta siblado de la grandegulagloflugiloj.

"Kial trompas al vi kidnapo mian infanon?" ploris la aglon.

"La infano estas mia ĉar mi konservis ĝin por la serpento kiun vi ne mortigis," la junulo respondis.

"Donu al mi reen mian infanon, kaj mi donos al vi kiel rekompenco la akrecon de miaj okuloj kaj la potencan forton de miaj flugiloj. Vi iĝos nevenkebla, kaj vi estos vokitaj sub mia nomo!"

Tiel la junulo transdonis inte la aglidon. Post kiam la aglido kreskus, ĝi ĉiam flugus super la kondukanto de la junulo, nun plenkreska viro, kiu kun sia arko kaj sagoj mortigis multajn sovaĝajn bestojn de la arbaro, kaj kun lia glavo mortigis multajn malamikojn de la tero. Dum ĉio el tiuj atingoj, la aglo fidele protektis kaj gvidis lin.

Mirigita per la faroj de la kuraĝa ĉasisto, homoj de la tero elektis lin reĝo kaj nomis lin Shqipëtar, kiu estas diri Son of the Eagle (Filo de la Aglo) (shqipe aŭ shqiponjë estas albana por aglo) kaj lian regnon iĝis konataj kiel "shqipëria" aŭ Land of the Eagles (Tero de la Eagles). La du kapoj sur la aglo reprezentas la nordon kaj la sudon.

(Ĉerpita de Malgosia Komarnicka)

Noto:

En la kvara jarcento antaŭ Kristo loĝis ilira gento de "albanoj" en la loko nomita "Albanopolis" (nuna "Zgerdhesh", apud la nuna urbo Kruja, je 32 km nordoriente de Tirana).

Iliroj reprezentis grandan antikvan plurgentan popolon loĝanta en la tuta Okcidenta Balkanio, de Danubo ĝis Adriatika Maro kaj de Istrio (nun en Italio) ĝis Golfo de Arto (nun en Grekio). Iliroj loĝigis ankaŭ certajn aliajn partojn de suda Italio.

Oni nomis "Albanoj" ĉiujn posteulojn de iliroj loĝintaj en la teritorioj de nuna Albanio, Kosovo, Okcidenta Makedonio, Suda Montenegro, Suda Serbio, Nordokcidenta Grekio. La aliaj popoloj ekproncis ilian nomon diversmaniere. Tiel, la grekoj diris Arvanitoj, la turkoj diris Arnautoj, la serboj diris Arbanas-oj, la italoj diris Albanez-oj, rusoj Albanci, ktp.

Mem albanoj sin nomas "Shqiptar-oj" (Ŝkiptaroj), kio signifas "Filoj de la aglo", almenaŭ ekde la oka jarcento post Kristo, kiam ili fondis sian unuan ŝtaton. La lando nomiĝas Shqipëria (Ŝkipëria) kio videblas ekz. sur la poŝtmarkoj. Tio ne estas esceptaĵo ĉar italoj nomas germanojn tedeski, francoj alemanoj, rusoj njemci, ĉu ne? Dume mem germanoj sin nomas Dojĉi. Post la definitiva invado de la lando far otomanaj armeoj en la fino de XV jc centmiloj da albanoj fuĝis al suda Italio kie loĝas ankoraŭ iliaj posteuloj. Oni nomas ilin "Arbereŝ-oj" kio rilatas al la nomo "Arber" devenanta el la vorto "Alban".

Fakte la nacio albana kaj ties lingvo ekformiĝis surbaze de ilira tradicio.

Oni konsideras ke albanoj loĝantaj kompakte en siaj propraj teroj supre menciitaj nombras ĉirkaŭ 7 milionoj.

Ili loĝas en ses balkanaj ŝtatoj: Albanio, Kosovo, Makedonio, Montenegro, Grekio kaj Serbio.

(el la diplomalaboraĵoj de niaj studentoj)

Forlasas la planedan kruston la itala neŭroscienristino kaj humanistino Rita Levi-Montalcini

Ŝi estis tiu, kiu deklaris la egalecon de inteligenteco inter viroj kaj virinoj, inter multaj kaj multaj aliaj deklaroj, kiujn ŝi faris, bazitaj sur ŝiaj sciencaj esploroj dum tuta vivo je 103 jaroj tie ĉi sur la tera krusto.

<http://www.dgabc.com.br/News/6001515/premio-nobel-de-medicina-morre-aos-103-anos.aspx>

Bedaŭrinde ankoraŭ ne ekzistas en Esperantujo esperanta tutmonda novaĝ-agentejo, por anonci urĝe informojn gravajn, kia tiu ĉi. Konsiderante la vivon de Rita Levi-Montalcini, riĉan je homspertoj kaj sindediĉo al la afero de la homo, ni povas aserti, ke ŝi estis nekonscia esperantistino.

Mi suspektas, ke Rita Levi-Montalcini, pro la scienca kono, kiun ŝi havis, certe uzis kelkajn laboratoriajn rimedojn por teni ĉiam renovigitaj siajn neŭronojn kaj cerban sanon, kio kun certeco reefikis en ŝian fizikan sanon kaj sekve en ŝian longaĝecon...

Nu, plej probable estas, ke, apoginte sin sur la fakto, ke ŝi estis ateistino, ŝi sin dediĉis ekskluzive al la scienco, sen ĉagrenaj limiĝoj kaj baroj je religia etiko. Tiel, ŝi ne suferis sentojn proprajn al tiuj senokupaj kaj egoistaj "dio-timuloj", kiaj timo, krizoj pro pentoj, obsedoj ktp. La laboratorio estis ŝia preĝejo. La homa cerbo estis ŝia altaro. La laboro estis ŝia preĝo. La deziro servadi al la homaro estis ŝia sankta dogmo.

Pro tio, ŝi ne infektis sian animon per mallumaĵoj. La amo mem al tio, kion ŝi faris, estis ŝia plej granda subtenilo, kaj certe ĝi elĵetigis el ŝia cerbo milionojn kaj milionojn da filigranoj el serotonino kaj endorfino (la plej bonaj vitaminoj por la korpo kaj animo) tra ĉiuj ŝiaj korpaj kaj perispiritaj ĉeloj, ĉiutage, dum ĉiuj tiuj jardekoj da sindediĉo al tio, kion ŝi faris.

Cetere, estinte homo kiu nenion petis, sed nur servis, ŝi certe havis konstantan helpon de nevideblaj sciencistoj, en projektoj, kiuj helpis milionojn da homoj tie ĉi sur la Tero (speciale en la tereno de diabeto).

Sume la itala-tera sciencisto Rita Levi-Montalcini estis vera homara bonfarantino, iamonaĥino Tereza el Kalkuto en la scienco; iu, kiun la "homoj de tie supre" bezonis tre sana, agema kaj kuraĝa tie ĉi sur la tersurfaco dum longa tempo. Nun ŝi revenas al la Centra Laboratorio, plenuminte la longedaŭran mision.

Ŝi estis deklarinta:

"La sekreto de mia vivoforto estas tio, ke mi vivas senĉese okupanta min je la scienca esploro kaj je la sociaj problemoj. Mi ne havas tempon pensi pri mi mem."

[El ĉiu maniero vidi la vivon oni povas fari profiton, kondiĉe ke tiu profito servu por la homa pliboniĝo de si kaj de aliaj. Rita eĉ povis esti estinta ateistino. Postvivinta al du mondmilioj, ŝi povas komprenigi tion. Sed, superinte ĉiujn siajn traŭmojn, per la amo al la scienca produktado, ŝi ekestis esenca peco en la evolua maŝinaro de la planedo, helpante milionojn, kiel praktika humanistino (ne simple laŭ diskurso). Se ŝi ne kredis al Dio, Dio kredis al ŝi kaj investis pri ŝi dum ŝia tuta vivo. Eble ŝi ne havis tempon dediĉi sin al la kredo al Dio, pro tio, ke ŝi estis tro okupiganta per la servado al Li.

Tamiris Assunção

<tamirinha1992@gmail.com>

Beletraĵoj

Trasomere

Kio ĉion reĝisoras?

Maro ludas simfonie:

Onden iras homoj, homoj...

Verdarĝenta pulmo spiras:

Ventr' patrina ritme pulsas

Laŭ brilŝauma partitur'.

Homamaso trasomeras

Sunombreloj bunte svarmas...

Ĉu foiro? Ĉu altar' ?

Someranoj sin ofer(t)as

Por adori sunon ... maron ...

Ĉu verĝojas la estuloj?

Scivolemas la poeto.

Jen - audiĝas voĉ' sekreta -

Plezurplenaj ekzistuloj!

Maria Nazaré de C. Laroca

Kabo Frio – RJ Brazilo

Novjaro

Vivo adas plue...

Ne gravas tiu, kiu

Sur temp' rajdas fluge.

Eroj el moment',

Into, onto antas,

Nunon kaŝante.

Tuj ekos Novjaro;

Ritoj al homar' utilas.

Tamen tute survoje

Necesas malpleniĝo:

Vivo plue adas...

Maria Nazaré de C. Laroca

Kabo Frio - RJ Brazilo 31 / 12/ 2012

Fjalë të urta

Sağaj vortoj albanaj

Kurseve thuprën, do të prishësh fëmijën.

Şparita vipo, maledukita infano

2. Mjerë njeriu që beson në ndihmën e fëmijëve.

Povra tiu kiu esperas je la helpo de infanoj.

3. Lavdërimet e tepërta çorodisin fëmijët.

La troaj laŭdoj konfuzigas infanojn.

4. Zogu llafazan nuk ka për të bërë çerdhe kurrë.

La babilema birdo neniam starigos sian neston.

5. Kush dëgjon, kupton.

Aŭskultino, kompreninto.

6. Shpata plagos trupin, fjala shpirtin.

La glavo vundigas la korpon, la parolo- la animon.

7. Dy fjalosës të mirë nuk vlejné sa një dëgjues i mirë.

Du bonaj konversaciantoj ne valoras pli ol bona aŭskultanto.

8. Ku ka tepëri fjalësh, ka mungesë zgjuarsie.

Kie troas la paroloj, mankas la sağeco.

9. Një gjuhë e ëmbël rralle është pa një ferrë në majë.

Dolça lango rare estas sen dorno surpinte.

10. Mos e thuj më gjuhë atë që mund ta paguash më kokë

Ne diru per lango tion pagota perkape.

11. Është më i keq se memeci ai që s'flet qartë.

Pli malbonas ne klara parolanto ol la mutulo mem.

12. Ja fol e mba, ja dhit e ha.

Aŭ parolu kaj toleru, aŭ feku kaj manĝu

13. Nevoja për fjalën ndjehet çdo minutë, për këngën një herë në muaj

ose në vit! Njerëzit, megjithatë, përpiqen të mësojnë këngë e jo si të kuvendojnë.

La bezono por la parolo sentiĝas ĉiuminute, por la kanzono unufoje monate aŭ eĉ jare! La homoj, tamen, klopodas ellerni kanzonojn anstataŭ kiel konversacii.

14. Përmes gabimesh bëhesh i ditur.

Oni fariĝas klerulo tra la eraroj.

15. Ç'vlerë ka të nxitosh kur je në rrugë të shtrembër.

Kion valoron havas hasto kiam vi iras eraran vojon.

16. Herët a vonë gënjeshtro turpëron të zone

Frue malfrue la mensogo hontigos la mensogulon.

17. Gënjeshtro është si plaga; edhe po u shërua lë shënjë.

La mensogo similas al vundo; eĉ kuracite ĝi postlasas signon.

18. Çdo pemë ka një rrënjë, çdo grindje ka një shkak.

Ĉiu arbo havas sian radikon, ĉiu kverelo havas sian kaŭzon.

19. Zëmërimi nis me çmënduri e mbaron me pendim.

La kolero komenciĝas per frenezeco kaj finiĝas per penteco.

20. Ndërsa grindesh për një çerek derri humbet një vathë delesh.

Kverelante pro kvarono da porko oni povas perdi tutan gregon da ŝafoj.

21. Këlyshi i gatshëm për kafshim i ka gjithnjë veshët të shqyer.

La pretpreta mordanta ido havas siajn orelojn çiam ŝiritajn.

22. Vëllezërit në shtëpi grinden si hajdutë, jashtë zhveshin shpatat në mbrojtje të njëri-tjetrit.

La fratoj interkverelas hejme kiel rabistoj, tamen ekstere perglave defendas unu la alian.

23. Nëse dy njerëz grinden edhe qentë e tyre do të kenë kundërshti.

Se du homoj interkverelas, ankaŭ siaj hundoj kontraŭstariĝas.

24. Kur familjet grinden, të huajt tallen.

Kiam familioj interkverelas la fremduloj mokas ilin.

25. Kush do të grindet e gjen rastin për çdo shteg.

Kiu emas kvereli trovas ankaŭ pretekston.

26. Një minutë bisedim është më mirë së një javë luftë.

Unu minuto da konversacio pli bonas ol unu semajno da milito.

27. Kur dy vetë grinden rrallë është faji vetëm në njërën anë.

Kiam du personoj kverelas rare kulpas nur unu el ili.

28. Kur zihen qentë ha ujku dhëntë.

Kiam la hundoj kverelas la lupo formanĝas la ŝafojn.

29. Një grua gjysëm djall, dy gra dhjetë djaj.

Unu virino estas duondiablo, du virinoj estas dek diabloj.

30. Më mirë e rrahura e djalit se sa e puthura e dhëndërrit.

Pli bone vin batu la filo ol kisu la bofilo.

31. Zemra mund ta dojë por ç'thotë kuleta.

La koro volas sed la monujo ne.

32. Mos u helmo i helmuar; jeta shkon me të qarë e me të kënduar.

Ne veneniĝu venenulo; la vivo estas jen plorado jen kantado.

33. Mos gjyko pa dëgjuar të dy palët e debatit.

Ne juĝu sen aŭdinte ambaŭ flankojn en la debato.

34. Kush gjykon të tjerët dënon vetveten.

Kiu aliulojn prijuĝas li sin kondamnas.

35. Kush mbjell zemërim korr pendim.

Kiu koleron semas li rikoltas penton.

36. E pyetën bretkocën pse gërrhet vazhdimisht, u përgjigj, më magjeps zëri im.

Oni demandis la ranon kial ĝi senĉese ronkas, kaj la respondo estis ke plaĉas al ĝi sia voĉo.

37. Më mirë shëndet se mbret.

Pli bone esti sanulo ol reĝo.

38. Jeta e njeriut është shëndeti, shtëpia dhe fëmija.
La vivo de la homo estas la sano, la hejmo kaj la infanoj.

39. Është dyfish kënaqësi të gënjeshtarin.
Estas ja duobla plezuro kiam oni trompas la mensogulon.

40. Zemra gjithmonë gabon mëndjen.
La koro çiam erarigas la menson.

41. Zemra është skllave e mëndjes. Çfarë mund të bëjë një mëndje e mirë që ka rënë skllave në dorën e një zemre të ligë?
La koro estas sklavo de la menso. Kion farus bona menso falinta kiel sklavon de malica koro?

42. S'ka poshtërsi më të madhe së të përpiqësh t'i bësh keq njeriut duke përfituar nga thjeshtësia e zemrës e qëllimi i tij i mirë.
Ne ekzistas pli granda fioco ol klopodi malboni al la homo profitante de ties kormodesteco kaj bona intenco.

43. Sekretet e mësimet të madh është të mendosh shumë dhe të flasësh pak.
La sekreto de granda leciono estas longe pripensi kaj malmulte paroli.

44. Lotët që derdh gruaja, kushtojnë fare pak për të, por kanë vlerë të madhe për të tjerët që i shikojnë.
La larmoj elverŝitaj de la virino, malmultekostas al ŝi, sed tre valoras por la aliuloj rigardantaj.

45. Burri më i lumtur ka qënë Adami se s'ka pasur vjehërr.
La plej feliça viro estis Adamo çar li ne havis bopatrinon.

46. Sa më e madhe stolit e një gjëje aq më e vogël dobia e saj.
Ju pli ega la ornamaĵo de iu objekto des pli eta ties utileco.

47. Është e urryer këshilla e dhënë para shumë njerëzve.
Malshatata estas la konsilo donita antaŭ multaj homoj.

48. Gruaja dredharake është trëndafil që gjethet ia mbajnë të tjerët, gjëmbat ia mban burri.
La malĉasta virino estas rozo kies foliojn tenas la aliulojn, dum la dornojn la edzo.

49. Hunda në lis, morri n'kurriz.
La nazo surkverke, la pediko surdorse.

50. Sa zuri qerosi lesh gjithë botën përlesh.
Ĵus lanumiĝis la kalvulo, tutan mondon li ekmokas.

51. Tre sendet më të neveritshme : varfanjaku mëndjemadh, pasaniku rrenacak e plaku matuf.
Tri kozoj estas plej abomenindaj: la orgojla malriĉulo, mensogema riĉulo kaj la malsaĝa maljunulo.

52. Çdo libër duhet të përtypet për t'i thithur lëngun.
Oni devas tramaĉi ĉiun libron por elsuĉi ties likvon.

53. Shkon në gjykim për një dele e do të humbasësh lopën.
Petas juĝadon por unu ŝafo kaj perdas la bovon.

54. Njeriu mund të humbasë çdo liri, por po ruajti lirinë e mendimit është prapë i lirë.
La homo povas perdi ĉiun alian liberecon, sed restas libera eĉ konservinte la pensliberon.

55. S'ka lumturi më të madhe se rifitimi i lumturi së humbur.
Ne ekzistas pli granda feliĉo ol la regajno de la perdita feliĉo.

56. Lumturia nuk gjendet në pasuri por në zemër! Njeriu nuk bëhet i lumtur duke arritur gjërat e vlefshme, por duke arritur çfarë i dëshiron zemra.

La feliço apenaŭ troviĝas en la riĉaĵoj krom en la koro! La homo ne fariĝas feliĉa akirinte valoraĵojn, sed nur tiujn ŝatataj de sia koro.

58. Në botë nuk ka njeri as fare të lumtur, as fare fatkeq ; më i lumturi e ka një brengë, më fatkeqi e ka një shpresë.

En la mondo ne ekzistas homo tute feliĉa, nek tute malfeliĉa; la plejfeliĉulo havas eĉ unu zorgon, plejmalfeliĉulo havas unu esperon.

59. Kur nuk ka armiq nuk ka as lavdi.

Kiam ne ekzistas malamikoj mankas ankaŭ la gloro.

60. Lumturia e njerëzve është në duart e grave.

La homa feliĉo estas en la manoj de virinoj.

61. Lumturia e kombit varet nga edukimi i femrës së tij.

La feliĉo de la nacio dependas de edukado de ties inaro.

62. Bli sa të duash dhurata, po nuk të desh gruaja, do të marrë një tjetër.

Aĉetu kiom ajn da donacaĵoj, sed se ne deziras, la edzino edziniĝos al aliulo.

63. Burri im s' bēhet xheloz dhe sikur të vinte dashnori me qiri në dorë.

Mia edzo ne ĵaluzas eĉ se alvenus la amanto kun kandelo enmane.

64. Ndonjëherë është mirë t'i bindesh një gruaje të mënçur.

Iamfoje estas bone obei al saĝa virino.

65. Më mirë gjysmë varur së keq martuar.

Pli bone duonpendigite ol misedzigite.

66. Kush ia tregon të gjitha gruas, është martuar për një kohë të shkurtër.
Kiu rakontas tuton al la edzino, estas edzignite nur provizore.

67. Të gjitha janë vajza të mira, po nga dalin këto gra të këqija?
Çiuj estas ja bonaj knabinoj, do kiel aperas çi tiuj malbonaj virinoj?

68. Kush ka gruan të hijshme duhet të këtë më shumë se dy sy.
Kiu havas çarman edzinon devas havi pli ol du okulojn.

69. Po të tha gruaja të hidhësh nga shkëmbi, lut zotin të jetë shkëmb i ulët.
Se la edzino demandas vin eksaltu de la ŝtonego, preĝu al Dio ke estu malalta ŝtonego.

70. Sa e trishtë është shtëpia ku këndon pula e hesht gjeli.
Kiom trista estas la hejmo kiam kantas la kokino kaj silentas la virkoko.

71. Një grua e mirë është vepër e një burri të mirë.
Bona edzino estas verko de bona edzo.

72. Para së të martohesh, mendo mirë se ç'po bën.
Antaŭ ol geedziĝu, bone pripensu la farotaĝon.

74. Një herë në dyzet vjet bëj atë që të thotë gruaja.
Unufoje en kvardek jaroj faru tion kion diras la edzino.

75. Janë të shumtë ata që martohen, por jo të paktë ata që pendohen.
Multaj geedziĝas, sed ne malmultaj pentas.

76. Shkoi gomari për brirë e humbi veshët.
Postulis la azeno kornojn kaj perdis la orelojn.

77. Kërkon gomarin dhe është mbi të i hipur.
Li serças azenon kvankam mem surdorsas ĝin.

78. Mban byzylyk në dorë kur stomaku e këput urie.
Li tenas juvelaĝon enmane kiam la abdomeno malsategas.

79. Ç'nevojë ka të ngjyrosësh korbin me të zezë.
Kian bezonon havas la korvo por sin nigrekolorigu.

80. Të flasësh me të marrin është si të hedhësh ujë në brokën e përmbysur.
Paroli kun la frenezulo tutsimilas enverşi akvon en renversitan poton.

81. Nuk gërmohet mali për të nxjerrë një mi.
Ne indas elfosi monton por elçerpi muson.

82. Për të marrë një tullë nuk shëmbet xhamia.
Ne indas detruir moskeon por ricevi brikon.

83. Ka fëmijën në krah e thërret se i ka humbur në qytet.
Tenas infanon subrake kaj krias ke perdis ĝin en la urbo.

84. Mos ço kurrë pulën për të thirrur dhelprën.
Neniam sendu la kokinon por voki la vulpon.

85. Fut djathin në shishe e fërkon bukën nga jashtë.
Enmetas la fromaĝon en la botelon kaj frotas la panon deekstere.

86. Dijetari nuk thotë çka di, i marri nuk di çka thotë.
La sciulo ne diras kion li scias, la frenezulo ne scias kion li diras.

87. I mënçuri tregon shumë gjëra me pak fjalë ; i marri flet gjithë ditën e s'tregon asgjë.
La saĝulo rakontas multon per malmulte da vortoj; la frenezulo tutan tagon parolas sed nenion rakontas.

88. Një mësues i mirë është më shumë së një raft më libra.
Bona instruisto estas pli ol ŝranko da libroj.

89. Mësuesi të hap portën, por brënda duhet të futesh vetë.
La instruisto malfermas la pordon, sed enen vi devas mem eniri.

90. Pi ujë pasi të lodhesh e zgjidh mësuesin pasi ta njohësh.
Trinku akvon laciĝinte kaj elektu instruiston koninte lin.

91. Më mirë ta durosh mikun se sa ta humbasësh përgjithnjë.

Pli bone toleru la amikon ol porçieme perdu lin.

92. Me shumë vështirësi bëhet një mik për një vit, por fare thjesht mund ta humbësh për një orë.
Tre malfacile akireblas dum jaro unu amiko, sed tutsimple vi povas perdi lin ene de horo.

93. Më trego një mik që pranon të qajë me mua, se ata që duan të qeshin i gjej vetë.
Montru al mi amikon kiu pretas kunplori kun mi, çar tiujn kiuj pretas kunridi mi trovas mem.

94. Mos bëj vizita tepër të shpeshta e tepër të gjata.
Ne faru vizitojn tre ofte kaj tre longe.

95. Mos u prish më vëllanë për shokun! Shoqëria zhduket, vllazëria mbetet.
Ne kverelu kun la frato pro via amiko! La amikeco malaperas, sed la frateco plurestas.

96. Nëse do t'ia dalësh diçkaje, pyet tre të moshuar.
Se vi volas akiri ion unue petu konsilon de tri maljunuloj.

97. Edhe luani kur plaket bëhet lodër e çakejve.
Eç la leono maljuniçinte fariças ludilo de çakaloj.

98. Ndërgjëgjia ndëshkon shpirtin.
La koscio kondamnas la animon.

99. Nuk turbullohet elefanti se e gjuajnë me gurë.
Oni ne povas turbuli la elefanton per alçetado de çtonoj.

100. Mbasi të ketë vdekur, s'ia vlen të thërrasësh mjekun.
Mortinte iu, ne indas voki la kuraciston.

101. Të falësh atë që s'është penduar është si të pikturosh në ujë.
Pardoni nepentinton estas kvazaç pëntri surakve.

102. Nuk ia vlen t'i japësh pasqyrën të verbrit e t'i këndosh të shurdhit.
Ne valoras doni la spegulon al la blindulo kaj kanti al la surdulo.

103. Sado ujë t'i hedhësh gurit prapë gur mbetet.
Kiom da akvo surverçi al la çtono ççi plurestas çtono.

104. Nuk di të drejtojë viçin e do të drejtojë demin.
Li ne kapablas menaçi la bovidon kaj deziras menaçi la virbovon.

105. Sado i pasur perandori s'mund të blejë një vit jetë më shumë.
Kiom ajn riça estu la imperiestro li ne kapablas açeti unu plian vivjaron.

106. Paraja e shikuar në ëndërr s' shërben për pazar.
La mono vidite ensonge ne servas por acetumi.

107. Lepurusha desh të nxjerrë vezë si breshka, u përpoq aq shumë sa ngordhi.
La leporino volis eligi ovojn kiel la testudo, ege klopodis gis gi mortis.

108. Mos e shit lëkurën e ariut që është ende në strofull.
Ne vendu la ursan felon dum çl lasta trovi gas ankoraŭ en sia nesto.

109. Dashuria ndaj parasë është shkatërrim i njeriut.
La amo por la mono signifas la degeneron de la homo.

110. Vajza me djep ari, s' rri gjatë në shtëpinë e babait.
La knabino kun ora lulilo, ne longe restas en la patra hejmo.

111. Një i varfër që frekuenton pasanikun shpejt do të varfërohet aq shumë sa mund të mos të blejë dot as edhe një palë pantollona.
Malriçulo frekventanta riçulon baldaŭ tiom multe povri gas kiom apenaŭ li povus acetu eç pantalonon.

112. Kush ka para, merr para.
Kiu posedas monon, tiu ricevas gin.

113. Nuk blihet dituria me pasuri.
Oni ne povas acetu scion per riçeco.

114. Atij që s' ka para i mungon gjithçka.
Al kiu mankas la mono, mankas çio.

115. Edhe një kështjellë afruar për një dinar është e shtrënjtë kur mungon dinari.
Eç kastelo ofertita je 1 dinaro estas multekosta kiam mankas dinaro.

116. Në botën e përtejme fajdexhinjëve u duhet të numurojnë monedha të skuqura më duar të zhveshura.
En la transa mondo la lumonaj homoj devas nombri ardiĝintajn monerojn per nudaj manoj.

117. Njeriu pa para e përshkon shpejt pazarin.
Senmona homo trairas rapide la bazaron.

119. Shiu bie malit por përmyt luginat.
La pluvo falas en la monton sed inundas la valon.

120. Mos i shih hajdutët kur kanë peshk, më mirë shihi kur të ndëshkohen.
Ne rigardu ŝtelistojn kiam ili havas fiŝon, pli bone rigardu ilin kiam oni kondamnos ilin.

121. Po kafshove gurin do të thyesh dhëmbët.
Se vi mordas la ŝtonon vi rompos viajn dentojn.

122. Sa më thellë të futësh në pleh aq më shumë do ndotesh.
Ju pli profunde vi eniras en la sterkon des pli vi malpuriĝas.

123. Ke para, ke përendi, pa para s'të do njeri.
Havas monon, havas Dion, senmone neniŭ amas vin.

124. Paraja në dorë verbon të zotin.
La mono enmane blindigas la ties poedanton.

125. Paraja tradhëtoi Krishtin.
La mono perfidis Kriston.

126. Pika më e mirë e pasurisë është as shumë afër as shumë larg nga varfëria.
La plej bona punkto de la riĉeco estas ne tre apude nek tre malproksime disde la malriĉeco.

127. Pa Shqipëri, Kosovë nuk ka, Pa Kosovë nuk ka Çamëri. Të tria bashkë bëjnë Kala.

Sen Albanio, ne estas Kosovo, sen Kosovo ne estas Ĉamerio. La triopo konsistigas Kastelon.



Millosh Gjergj Nikolla- Migjeni (1011-1938)

Migjeni – La poemio pri la mizero

Neenglutebla buŝpleno ja estas la mizero, mia frato,

Buŝpleno restanta engorĝe kaj tristiganta,

Vidanta palajn vizaĝojn kaj verdiĝintajn okulojn,

Rigardantaj kiel ombroj kaj etendantaj siajn malviglajn manojn.

Kaj tiel etendataj plurestas malantaŭ mi

La tutan vivon ĝismorte.

Kaj super ili, en aero, kvazaŭ mokece,

Tranĉas la ĉielon la ŝtonaj krucoj kaj minaretoj,

La profetoj kaj sanktuloj brilas per multkoloraj vestoj.

Kaj la mizero envere sentas perfidecon.

La mizero havas sian malbelan stampon;

Estas ĝi abomeninda, malbona, hontinda;

La ties frunto, la esprimigaj okuloj,

La lipoj envane kaŝi klopodantaj

Estas ja la infanoj de nescio kaj oferaĵoj de la malestimo,

La malpuraj postrestaĵoj ĉirkaŭ la tablo

Sur kiu jam vespermanĝis malkompatebla hundo

Kun jarcenta ventro, ĉiam malsatebla.

La mizero ŝancon ne havas. Sed havas nur ĉifonaĵojn,

Ĉifonaĵojn de kapo ĝis fundo, flagojn de espero

Disŝirita kaj dispecigita senrenverse.

La mizero furioziĝas pro lasciva amoro.

En mallumaj anguloj, kune kun hundoj, katoj, musoj,

Sur ŝimaj, malpuraj, malsekaj matoj,

Nudiĝas la karnoj, kiel velkaĵojn; flavaj kaj malpuraj;

Interplektiĝas la sentoj per bestia forto.

Mordas, formanĝas, absorbiĝas, interkisiĝas la sekiĝintaj lipoj
Estingiĝas la malsato, kaj malpliĝas la soifo
En la alkaptita volupto, kiam sufokiĝas la memo.

Kaj tie konceptiĝas la frenezuloj, servutuloj kaj la almozuloj
Kiuj morgaŭ naskiĝos por plenigi la stratojn.

La mizero en la okullumeto ĉe la etulo
Tremas kiel la flambrilo senforta de la kandelo
Sub la fumigita plafono plene de araneoj,

Kie homombroj tremas sur muroj plenmakulitaj,
Kie la malsana bebo ploras kiel malbonanimo
Suĉante la elĉerpitajn mamojn de la povra patrino,

Kiu denove graveda, malbenas Dion kaj Diablon,
Malbenas sian idon, malbenas pezan ŝarĝon.
Ŝia bebo ne ridas, nur kadukas,
La patrino ne amas, sed nur malbenas.

Kiom trista ja estas la lulilo de la malriĉeco
Kie la bebon lulas la larmoj kaj la furiozaĵoj!

La mizero kreskigas la bebon subombre de la domoj
Altaj, kie apenaŭ atingas la voĉo de almozularo,
Kie oni ne povas detruigi la trankvilon al la sinjoroj

Kiam ili dormas kun siaj sinjorinoj en la litoj de feliĉeco.

La mizero maturigas la infanon antaŭ ol li viriĝu;

Volas instrui lin kiel eskapi la manpugnon minacantan,

Tiun manpugnon kiu strangolas lin engorĝe dumdorme

Kiam komenciĝas la febraj deliroj pro malsato

Kaj la vizaĝon de la infano kovras la ombro de la morto,

Fatala ornamaĵo anstataŭ la rideto.

Frukto maturita estas sciite kien ĝi iras

Samtiel ankaŭ la infano en la tera ventro finiĝas.

La mizero laboras, laboras tagnokte
bolante la ŝvito surbruste kaj surfrunte,

Malpuriĝante ĝisgenue en la koto
kaj denove la intestoj pro malsato falfaldiĝas.

Ridinda rekompenco! Por centunu pasio

Potage nur: Frankoj tri-kvar kaj "marŝ!"

La mizero iamfoje havas lustrajn vangojn,

Lipojn akritajn, kolorigitajn vangopintojn,
la korpon- memorigilon de fikomerco,

Destinita enlitiĝi kun alia ulo;

Kaj por tiu servo perlaboros kelkajn frankojn

Sur litkovriloj, sur vizaĝoj kaj en la konscio makulojn.

La mizero ankaŭ lasas heredaĵon

Ne en la bankoj nek nmoveblaĵoj,

Sed la malrektiĝintajn ostojn kaj enbruste iun doloraĵon,

Povas lasi kiel memoraĵon la iaman tagon

Kiam forfalis la doma tegmento

Pro la tempa putrigado, pro la ĉiela pezo,

Kiam sur ĉio sentiĝis terura voĉo

Plene de malbeno kaj preĝo kvazaŭ el la infera fundo,

Estis la homa voĉo mortante subtrabe.

Tiel sub la pezaj piedoj de la rabia dio

Mortas laŭ pastro tiu vivinta perfortinte.

Kaj per tiuj memoraĵoj, ĉi tiuj malfeliĉaĵoj

Ĝispleniĝas la venena glaso dum heredado de generacioj.

La mizero havas konsolan fratinon la glason.

En la rancaj drinkejoj, ĉe la tablo plene de malpuraĵoj

Abomenaj, soifanta animo enverŝas la glason

En la gorĝon por forgesi naŭdeknaŭ zorgojn.

Kaj la turbula glaso, la diableca glaso
Karesante pinĉas kiel la serpento
Kaj la homo falante, kiel la tritiko de la serpo
Subtable plor-ridas je tragediforme.

Ĉiujn zorgojn la malriĉeco sufokigas per la glaso
Kiam centon da ili enverŝas unu post alia en la gorgĝon.

La mizero ekbruligas la dezirojn kiel la mallumo la stelojn
Kaj fumigas kiel arbojn karbigas la fulmo.

La mizero ne havas ĝojon, sed nur doloraĵojn,
Neelteneblajn doloraĵojn frenezigantajn,
Donantaj la ŝnuron por ke vi mem pendiĝu
Aŭ iĝu povra oferaĵo de la paragrafoj.

La mizero apenaŭ volas kompaton. Ĝi volas nur juston!
Kompaton? Bastarda filino de la ruzaj patroj,
Kiuj pompe samkiel la fariseoj
Tamburas per vulpecaj sentoj
Alĵetante al la almozulo moneron maldikan sur la manplato.

La mizero estas ne forviŝebla makulo
Surfrunte de la homaro pasanta dum la jarcentoj
Kaj ĉi tiun makulon neniam eblas

Forstreki la ŝvabriloj ŝimitaj en la temploj.

Enesperantigis Bardhyl Selimi

Senad Guraziu

(Kosova verkisto)

La adiaŭaj ŝuoj

La vespero havis ion vintrecan en si mem, tion Zgjim ne komprenis sed li havis ian senton kvazaŭ tio estis vespero du-tri tagojn antaŭ Kristnasko, vespero kun neĝoflokoj ie en Birminghamo, de kie li venis. Pasis jam 7-8 jaroj ke li vivas tie. Tamen ne, tio estis freŝa septembra vespero, ordinara Priŝtina vespero. Bazite sur la mesaĝoj de Zana, tio estis la dua tago je freŝeco post kelkaj monatoj da sekeco kaj varmego.

Fakte, la Kosova ĉefurbo, asfiksita pro betono, estis same tiel asfiksita de pulvoro. Simile al la semajno antaŭe, al la monato pli frue. Tamen pluvetis- laŭ Zana. Ne mencio pri la pluvo post tiom da monatoj plene de varmego povus konsideriĝi kiel ia falsigo..aŭ klara mensogo de ĉi tiu rakonto.

La butikoj kie ili alvenis ne estis speciale por la ŝuoj. Mem Zgjim ne certis ĉu ĝi povus nomiĝi "butikoj", ia Jumbo-butikoj, ia ega-super-butikoj....la ĉina malplenigita fabriko transformiĝinte al butikoj por ĉiuj varoj kune de Rumanio, Ĉinio, Bulgario, Turkio...Ĉiuj markoj "nemerkataj" je la stilo laŭĉina arigitaj en unu loko.

La plej granda butikoj de la postmilita Eŭropo por komfortaj ŝuoj, kvankam tie oni vendis ne nur ŝuojn. Iun pli grandan, samkiel iun butikoj- deponejon sen randoj, li neniam estis vidinta dum sia vivo.

Pli da spaco ne postulas eĉ la foiro de Frankfurto, nek iu Aero-Montrejo en Parizo, nek mem "la seksoludiloj" en la foiro de Londono, Amsterdamo, Tokio- li pripensis ridetante dum li rigardadis la longajn ŝrankojn senlimajn de la butikoj.

La trafiko estis same asfiksita, kelkaj paŝoj ankaŭ la ĥaosoj de la urba kolono reflektiĝis denove sur la vitroj, kvazaŭ denove tiu enuigita virino de la preterpasanta aŭto malrektiĝis sur ties vitro. Sed al Zgjim plaĉis "la malrapideco", li neniam ĉagreniĝis pro la trafiko, ĉar tiuj momentoj ĉiam pli multe elektriziĝis per sia romantikeco, profumo.

Li eĉ ne atentis pri io alia ekstere. La tuta lia mondo, fizike, anime kaj mense estis tie en la aŭtovesto. La muziko estis ne nur konsolo por la trafikdenseco kaj pro fakto ke la aŭtoj estis degenerintaj kiel la konfuzitaj testudoj de la parko en Germio, la muziko samtiel estis ia trankviligilo de iliaj sentoj.

Zana mem provis kelkfoje trovi ion pli "agrablan". Lastan fojon, tuŝinte la butonojn..ŝi signogestis ankaŭ al li ke finfine estis kontenta pro la melodio. Nek ŝi estis streĉita, kontraŭe, tre rilaksita. Aspektis kiel iom malpeza, kiel kotona bela masko, kiel Barbi-pupo sidanta ne tie en la sidloko sed suspende en la aero.

Fojfoje ridetis, per unu mano sur la stirilo kaj la alian ŝi enigis inter liaj manplatoj, rigardis lin kaj donacis la tutan rideton nur al li.

Tion ŝi diris per la plej dolĉaj okuloj de la mondo, per la plej belaj kiujn Zgjim estis iam vidinta.

Tiun vesperon, Zana aĉetis por li la adiaŭajn ŝuojn, aŭ pli precize, ili aĉetis kune. Ŝi preskaŭ insistis, kvazaŭ tiom multe estis entuziasmigita por aĉeti ŝuojn por li. Zgjim apenaŭ povis kontraŭstari al iu Zana, kiel oni povus kontraŭstari la esprimmaĵon de ŝia vizaĝo, kiu brilis kaj lumplenigis tutan lian estaĵon.

Al Zgjim tio ŝajnis anĝela vizaĝo sur la pentraĵoj, pura, hela, varma. Ne ŝajnis tiel nur ĉar li amis ŝin, nur ĉar li sentis pri ŝi. Laŭ li, ŝia rideto iel tiel donis lumon ankaŭ al la vojo antaŭen, eble pli ol la aŭtoprojektiloj. Ŝi mem estis tia, simple pro naturo estis bela estaĵo, freŝa, satigita je dolĉeco.

Ŝia voĉo, la varmecon de la rideto tenis lin, ekde tagoj, “ebriita”, neniel mensklara.

Sed nun la dolĉa voĉo sorĉigis ŝin eksterordinare kaj la sonoj de “La sekreta ĝardeno” elektitaj de ŝi, kvazaŭ retroiris surfone por ke profunde rifuĝu ie en la malnovaj ŝuoj survestitaj, aĉetitaj antaŭ du monatoj. Post kelkaj momentoj, oni donacus novajn ŝuojn, kiujn li bone sciis ke estos la adiaŭaj ŝuoj.

Tamen Zana ne sciis ĉi tiun detalon.

Kaj kun la ĉagreno ĝisrande maskita, li ĵuris ke survestus ilin ĝuste tiun tagon de la ekiro, tagon de la adiaŭo, kvankam la precizan tagon ne sciis. Li sciis ke sin disigus de kelkiu multe amata de li, por kiu li eĉ mortus. La tutan vivon li ekspektis renkonti ŝin, li povus morti en kiu ajn tempo por ŝi. Tiom li sciis nun, kaj kvazaŭ ne volis scii ion pli.

Sed li sciis ankaŭ ke neniam rilatus kun ŝi eble serioze. Zgjim kredis en la amo, kredis tre multe. La pasinto de Zana, tion kvazaŭ igis nebla. Kvazaŭ io estis stampinta ĉe li ke tio simple “kredis al nenio”, kvazaŭ io el ŝia sonĝo estis balanciĝinta iamtempe, estis malaperinta. Ne sentis ŝi pri serioza rilato krom la bedaŭro. Li tion sciis, eĉ sentis, bone komprenis.

Zana havis vundiĝintan koron du-tri fojojn kaj apenaŭ “aŭdacis” ekpensi pri la amo, tio kvazaŭ terurigis. Zgjim estis aŭdinta ĉiujn ties “historiojn”, nun estis nur bonsortulo por ricevi la ŝuojn. Estis bonsortulo ekĝui dum kelkaj tagoj la profumon kaj la varmecon ŝian. Ŝi farus ĉion por li, donacus ĉion dum kelkaj tagoj, kaj eĉ la “koron”. Ne nur ĉar mem ŝi nenion perdus, sed ankaŭ ĉar ŝi eksentis iom da bedaŭro, ŝi konis koron de li.

Zana simple estis manipulinta “iom” per liaj sentoj. Estis manipulinta ankaŭ lin, samkiel ankaŭ sin, ne volante vundigi- aŭ, ne pensante bone ke ŝi povus vundigi. Volis ekhavi la vivon kiel ŝi perceptis ĝin, plenigi ĝin per travivaĵoj kiuj estis ne eblaj kiam ne estis “libera”. Por ŝi ĉio estis tiel kiel estis, fluaĵo de la vivorivero.

La konatiĝo kun Zgjim estis samtiel ia “someramo”, spontanea aventuro, “por plezuro” kiel ofte diradis ĉi

tiun esprimajon en la konversacioj, rilate al ĉio.

Lastajn monatojn ŝi estis elvolvinta kelkajn siajn revojn al li. Parolis longe pri siaj disfaloj kaj nesorteco. Aŭ pli ĝuste: parolis pri ĉio, pri miliono da sekretoj. Eĉ ankaŭ pri la plej kaŝitaĵojn de sia koro, krom du-aŭ tri kozo silentigitaj. Ekzemple, ŝi ne rivelis la motivon de la “riĉeco”, kiu nun estis la centra moviga forto de sia amo.

Rivelis nek la fakton ke li ne estis la sola pormomente “amikeca rilato”. Do, la ĉefajn kozojn ŝi ja ne menciintis. Ne ĉar Zgjim estis naivulo, sed post longaj monatoj de interŝanĝo de sekretoj ankaŭ Zana havis okazon ekkoni lian koron. Tiumomente, rememoris pri maljunulino de “Titaniko” de James Cameron, la tuta filmo fakte estis ia konfeso de la bela protagonistino, nun en profunda maljuneco, surborde de la esplora ŝipo. Rememoris pri ŝiaj vortoj, “ la koro de la virino similas al oceano plene de sekretoj, sennombraj sekretoj kaŝitaj en ties koro”.

Plimalpli, por Zgjim ĉio estis klarigite. Ekzistis nur iom da diferenco inter la realaĵoj kaj iliaj mondkonceptoj, li apenaŭ havis motivojn nek kondiĉojn, li povis ami ankaŭ tiel envane, senpostuleme. Tiel kiel iris la aferoj, li simple devus kontentiĝi je tiome, pluresti amikoj..sed ankaŭ “amikoj” dividantaj la sekretojn kaj plezuraĵojn, kiun ajn sekreton. Kial ne eĉ pli ol tiom, se bezonate. Laŭ Zana tio estis amikeco kaj “ameco” moderna, kune. Io, ke se vi havas liberon kaj ne ekzistas rezono por plipretendi, ne estas malebla.

Zana, en multaj aferoj, kvazaŭ estis “erare influita” de serialoj je tipo “Sekso kaj la urbo”. Kvankam ne estis tiel, Zgjim simple maĉadis tion en sia kapo. Se oni paraleligus la “antaŭenirantan feminismon” de Novjorka libera virino al la kliŝeoj de la “Moderna Familio”, eble oni akirus la Priŝtinan version de la “Sekso kaj la urbo”, kaj kial ne, ankaŭ Tirana-n version. Nin ŝajnigus ke “la libero” neniel estis malrektiĝinta en ŝiaj revoj, kaj nek “reflektita” malbone en la realo de la Kosova metropolo. Ĝiaj standardoj koincidus finfine al la “idealistiko”, al la Novjorka utopismo pri la etikoj altruditaj de la “eliteca aristokratio”, ĉar ĉio absorbiĝas aŭ falas en la centran standardon de la naturo mem- de la porekzista milito.

La naturo kaj la elituloj de la okcidenta avangardo, certe, ekiras de la samaj premisoj. Ekzemple, en la Naturo, ĉio diktita de ĝiaj leĝoj konsistas en tio, kiel atingi la statuson de la “leonino” aŭ “leono”, poste oni povas piedpremi ĉiujn normojn kaj leĝojn de la ekosistemo, povas ilin neglegti, redizajni..eksperimenti laŭplaĉe kaj laŭ kiu ajn ideo en la kapoj de la leoneca elito. La aristokrata elito kreas modernan homon en Novjorko, Parizo, Londono, Tokio..modernan homon kiel ni konas, kiel ĝi prezentiĝas en la serialoj, en la filmoj de Holivudo, en la romanoj, reklamoj en miliono da revuoj de la mondo.

Kreas ĝin diktante la normojn, etikojn, emojn, politikojn, kulturon, modon kaj ĉion, milionon da kozo, sennombre da kozo. Ankaŭ la “Moderna Familio” kaj kiu ajn versio plej antaŭeniranta el la Priŝtina morgaŭo, la samon faras, kompreneble laŭ Kosova “rimeno kaj poŝo” koncerne la antaŭenirojn. La samon faras ankaŭ Top Channel per ties neoriginaleco (estu eĉ la unuaj en ĝia klaso kiel kopiulo) per mil kaj unu kopiaĵoj, “luaĵoj” kaj plagiataĵoj. Tamen ne nur ili, la leganto mem analizu iom pli profunde mem la nomon TV-Klan kaj tuj klariĝos, ne bezonante pluen analizi. La samon faras Arjan Ĉani per sia “Libera Zono” elsarkante la vojon al la eliteca junularo, hardante ties modernajn “standardojn”. Tiel agas ankaŭ

MTV je nivelo tuteŭropeca ekde la jaroj 90...se mi ne eraras pri ilia iniciato.

Tiel diktas la reguloj de kiu ajn antaŭenirinta socio, same en Parizo, en Priština, en Birmingamo. Je vortokaze, estus absurda se tio koncernus al la montaranoj de Qyqalla, aŭ malriĉuloj tie kie bojas la hundoj de Rezalla, ke oni proponu ideojn al la Priština leoneca elito...Aŭ el la kotplenaj getooj de Tirana, kelkiu kiel virkoko vendu siajn mensoglobetojn kvazaŭ kaprofekaĵojn de la kooperativo de Llakatundo al la elituloj de Bloko-kvartalo, bah, sensensaĵo!

Zgjim apenaŭ estis "ŝokigite" de iu ajn detalo de la kono pri la realo, nek de la kozosekvado koncerne lian romancon, sed ĉiam pli, tagon post tago, li sentis sin trafite de abrupta doloro. Kvazaŭ li estis konvinkite ke neniam eskapus al sia nesorteco. Iumomente, kiam Zana estis rakontante ion vespermangante ie en ĉirkaŭjo, preskaŭ eksterurbe, ekvolis alparoli ironie ke li konsideris bona ke ankaŭ Priština moderna virino finfine estas supermodernigita ĉirkaŭbrakinte la plejn antaŭenirintaj standardojn (je deveno de elitoj de Okcidento).

Kial ankaŭ la albana socio ne havu standardojn, kial ĝi ne estu armeo de "socio-klonoj", produkto de la moderna elito. Kial ne havu ankaŭ Priština sian version de la "Sekso kaj la urbo", poste ankaŭ Tirana, kial postrestantu Tirana urbanoj.

Sed li bone sciis ke tio estis frenezaĵo alveninta el la surfaco pro lia ĉagreno, pro lia enuo. Sciis ke tio estis simple purega frenezaĵo sia.

Li ne volus vundi ŝin iam ajn, neniel, pro nenio en ĉi tiu mondo, tial ankaŭ apenaŭ eldiru iun vorton pro kio ŝi eksentus sin malbone. Ankaŭ ŝi estis dirinta la samon koncerne la "vundiĝon". Li envere estis sentinta la bedaŭron en ŝia ĉirkaubrako kaj, ekde tiu momento, kvazaŭ ekamis ŝin pli. Amis tiel kiel ŝi estis, kun ĉiuj ŝiaj konceptoj kaj skizoj pri la mondo, ekamus eble la tutan vivon. Eĉ li kvazaŭ provis malpezigi ŝian konscion dirante: "se mi vundiĝos, tio okazos ĉar mi estos vundinta min mem, via afero tute ne estas malfrua, kontraŭe...kaj estas tre dankema por tio, neniu devigos nin korturmentiĝi kaj ĉirkaŭ ĝi, ni mem devas kontroli nian mondon de sentimentoj, la revoj estas ja revoj, la realo apenaŭ povas esti fabuleca, tiel ni ne estas infanoj kaj nek Disnilando, aŭ ne...".

Li elreviĝis kaj rivelis ke nenio estis revo, estis nur li konfuzita, kuntirita pro la doloro.

Restadis tiel tutan antaŭtagon, meditadis kuŝante. Havis la trankvilon, solecon, aromon de la floroj de la balkono kaj larmojn...ĝis ŝi revenu. Iom sin etendis eksteren en la balkono, kie li envere vidis la sekiĝantajn ŝuojn.

Lia menso iris al Vlora kaj sia patrino, ĉe fratino Ujeza kaj decidis denove reveni en Vlora dum kelkaj tagoj. Kial do tia sorto trafis min!- li pripensadis kvazaŭ volus konsoli sin. Dum la foriro mi transpasos ankaŭ du-tri landojn kun la ŝuoj surpiede. Sed krom aeroporto de Rinas, mi ne sentas sekurecon alie. Ĉar tiu dedektulo ilia por la metalaĵoj ofte envane bruas. Kaj certe unu el tiuj knabinoj aŭ iu junulo tre ĝentile ordonos min senŝuiĝi, zorgeme surmetos la ŝuojn sur aparato sed mi apenaŭ rezignos de ili.

Kiel infano kun larmiĝintaj okuloj li ĵuris ke konservos la ŝuojn tutan vivon. Ĵuris ke li zorgos pri ili, ankaŭ

povus fari ion ajn kun ili. Ili jam estis la simbolecaj ŝuoj de sia amo. Kvazaŭ la ŝuoj transformiĝis al io pro kio li donacus volonte sian koron, plej belajn sentojn, donacus ĉion kion li havis, por kiuj li ĉirkaŭbrakis la solecon. Sed ne, ne bezonatos, la ŝuoj ekscios lian sakrificon, neniam postulos de li ion.

Li konservos ilin porĉiame en sia dormoĉambro, tie en Birminghamo. Eble en la plej malgranda muzeo de la mondo, muzeo kun ununura eksponaĵo trans la montrofenestro- ŝiajn adiaŭajn ŝuojn. Neniu ekscios, nur li kaj la ŝuoj, ke kio estis en sia koro. La lasta kozo petota de kelkiu estos ke, kiam li forpasos al la transa mondo, oni entombigu lin kune kun ili, survestite.

Per tiome Zgjim estis konvinkite ke li neniun enuigos- tial sendube estos ununura sia demando, la lasta sia deziro.

En tia stato estis alveninta Zgjim, al li la mondo ŝajnis rifuĝota porĉiame en la gorĝoj de tiuj ŝuoj, ŝajnis ke li postrestos soleca por la tuta vivo. Aliflanke, kvazaŭ li apenaŭ kontraŭus se li perdus la koron pro io inda, ŝi estis ĉio, pli ol unu revo. Zana estis la princino de siaj songoj, sendepende de la cirkonstrancoj kaj la realo. Tiel li komprenis sian "mondon" de la amo, tiel li estis knedita en sia koro per revoj dumjare, tiel li kredis kun la tuta koro kaj rezono.

Vespere forirante, li ne diris "Adiaŭ" ..ne diris iun dolĉan vorton, lia voĉo estis premita pro doloro kaj malmoleco, nek li ĉirkaŭbrakis ŝin. Tiel blokita pro la doloro li ne sukcesis disiĝi dignece. Nek ŝi diris ion, stoicece trankvila kaj silenta, fiksita pro la bedaŭro, kondukis lin senlarme. Tamen Zgjim unuafoje esploris ke ŝia vizaĝo estis paliĝinta, ne plu aperis tiu dolĉa rideto, la anĝelaj okuloj ne plu havis brilon. Ĉu ŝi estis konsciiĝinta, kvazaŭ estis kompreninta iome ke "nevole" ŝi estis erarinta!

"La virina koro similas al oceano plenplene de sekretoj...", li apenaŭ povis scii tion. Tamen li deziris ke tio estu tiel, ke ŝia "memkonsciiĝo" estu vera, kvankam nenio povus malfariĝi..neniam.

Enesperantigis Bardhyl Selimi

Mustafa Greblleshi

Nero

(Ĉerpita el la libro "La Albumo de farbisto")

Lia vera nomo ne estis Nero. En la Civila Oficejo lia nomo estas Xhemal Rakipi. Sed per tia nomo apenaŭ oni konas lin. La plenkreskuloj kaj etuloj, proksimuloj kaj neparencoj, lin vokas Nero. Nero restis pro italoj, ĉar li estas korvenigra. Nigra kiel korvaj flugiloj estas lia haŭto. Eĉ mem li scias la signifon de tiu vorto "Nero" ĉar parolas orgojle laman italan, rapide kaj per gestoj, kiel napolano. Tion li ellernis kiam li laboris kiel ĉaristo ĉe italoj, dum okupacio.

Sur la nigra ovala vizaĝo bone vidiĝas la ridetantaj okuloj, la ruĝaj lipoj kaj la blankaj dentoj. Tiom blankaj kaj regulaj estas ĉe li la dentoj, kvazaŭ ili estus falsaj. Estas malaltstatura, sed premita kaj forta kiel fero. La harplenan bruston kovras lokloke malbutonumita ĉemizo ĝis la zono. Nero ne sentas malvarmon. Neniam oni vidas lin tremante kaj baraktante kiom da malvarmo estu. Li demetas la ŝuon kaj per nudpiedo rompas la glacieron kaj la glaciaĵojn de la torentetoj.

La hejmo, se ni konsideras tian la tendon, troviĝas trans la rivero, ĉe la kirpiĉejo. Du fojojn tage, frumatene kaj vespere post la krepusko, li trapasas la riveron ĝiszone kaj suprezone kaj apenaŭ suferas pro influenco. Ĉar li estas ferforta. Kiel mem diradas “la haŭto estas tanigita kaj transformita al ĉakala haŭto, al mokasena plandumo.”

Dum sia vivo li ekzercis diversajn laborojn kaj metiojn. Sed la vera lia metio estas tio de draŝisto, malsovaĝigi kaj draŝi neobeemajn ĉevalojn, freneziĝintajn junĉevalojn kaj haladzoplenajn ĉevalinojn. Nero igas la ĉevalon ekflugi, kvazaŭ per flugiloj. Li surdorsas aŭ surselas ĝin tiom orgojle, kvazaŭ estis naskiĝinta surĉevale.

Tempoj disigis lin de freneziĝintaj junĉevaloj. Forlasis la korbojn, la tamburinojn, forlasis ankaŭ la kirpiĉojn kaj la tegolojn. Nur la tendon plue lasis en la kirpiĉejo. Alvenis kaj membriĝis en kooperativo, kiel farbisto-helpanto kaj sin dediĉis al farbado. Tamen ankoraŭ ekvidante iun rapidan ĉevalon, brilharan, surgrimpante la monteton de Sankta Prokopo, la ridetantan vizaĝon lian envolvas ia nostalgia ombro. Ekgapas la ĉevalon kvazaŭ volas hipnotizi ĝin. Kaj la besto, mire, kvazaŭ komprenas la lingvon de Nero, kvazaŭ eksentis lian ardan deziron, skuas la kapon kaj salutas lin henante. Nur tiam la nostalgia ombro malaperas, la okuloj dronas denove en gajecon, la ruĝaj lipoj malfermiĝas kaj profunda “oh” disiĝas de la blanka koro de nigra Nero.

-Dio, pardonu tiun ĉevalon!

Kara kaj bona estas Nero. Lin plezurigas eĉ cigaredo kvazaŭ oni donacus militistajn pantalonojn por kiuj ege li revas. Ankaŭ la laborkolegoj lin amas kaj tenas proksime. Plaĉas al ili babili, ridi kaj ŝerci kun Nero. Nero pretpretas per respondoj, kiam oni demandas lin. Ĉiam li parolas gajplene. Nur kiam li rakontas okazintaĵojn el sia vaganta vivo, kiam eligas la koleron senĉese erodanta lin, la gajeco glaciigigas kaj amputiĝas ĉe ruĝaj lipoj.

-Vi, fratoj volis scii kiel mi aliris en via tero kiu fariĝis patrio mia. Ĉar mi kaj tuta nia gento ne scias kaj ne memoras pri nia propra patrio. Eĉ la migrantaj birdoj havas iun somerlimon kaj vintrolimon. Ni alvenis Albanion dum la milito, iom post la italoj kaj instaligis ĉe la Trisha Cedro, maltrans la rivero. La milito malhelpis nin pluvagadi kaj tiel ni restis ĉi tie. Post liberiĝo, unuafoje en nia vivo, oni registris kaj donis identigilojn al ni kiel ĉiuj la ceteraj homoj. Ĉar nin, gefilojn de la tendoj malnovaj kaj ĉifonitaj, neniam oni konsideris homojn. Ĉar mankis al ni patrio, riĉaĵo, signo. Nia riĉaĵo estis paŝtejeta, borde de la mondaj riveroj kie flaviĝis niaj tendoj, kiel fungoj, klematoj, kabanoj. Niajn tendojn oni vidis dumvespere, kiel fungoj post la pluvo kaj dummatene, antaŭ la tagiĝo ili malaperis. Malaperis kune kun la karavano vojaĝanta tutan vivon kun la hejmo, kiel limakoj. La limakoj rampas kun la konkvoj surdorse. Ni romoj vagadis kun la tapiŝetoj, aĵoj kaj beboj surbrake.

Longa suspiro interrompis la vortofadenon. Ĉar ĉe Nero ardas zorgo kaj kolero, li estas decidema furioziĝi:

Por la granda mondo, por la blankuloj, la nigra romo neniam estis estimita kiel homon. Li samvaloris kiom la fungo kaj la limako. Ni apenaŭ postlasis signon surtere postmorte. Ĉar kiel senhavuloj, ni havis nek tombojn, nek signon. La aĝuleco, malsanoj kaj malsato faligis survoje la elĉerpitan romon kaj vojrande oni enterigis lin, samkiel oni enterigus mortintan hundon, venenigitan hundon, malfeliĉan hundon. En ĉi tiu mondo estas ankaŭ hundoj je belaj nomoj lavataj en porcelanaj bankuvoj per la molaj kaj blankaj manoj de sinjorinoj, hundoj manĝantaj en pladoj kaj dormantaj sur varmaj agapaĵoj, en luksaj ĉambroj.

Mi havis anstataŭ agapaĵon la freŝan paŝtejan herbon kaj rifuĝejon - la flaviĝintan kaj ĉifonitan tolon de la tapiŝeto. Ankaŭ hodiaŭ, estas por mi ankoraŭ freŝa tiu agrabla musko de la ĵus falĉita herbo.

Severa estis nia vivo. Ĝi diferencis kiel tago al la nokto rilate la riĉulajn hundojn, tiujn portintaj unu nomon. Kiom foje malsekigis min la pluvo! Kiom foje knalis min la ŝtormo! Kiom foje lacegigis min la dormo en iu anguleto kaj neĝo dumnokte kovris min per la ties blanka vatkovrilo!

Havante kiel tertukon kaj kovrilon neĝon, mi estis sonĝinta avide kaj envie la riĉulajn hundojn. Sed jen alvenis tago kaj mia nomo estis registrite en la homa nomlisto. Oni havigis ankaŭ identigilon. Donis al ni ankaŭ agrotekon. Kaj laboron. Ekhavis ankaŭ ni bezonaĵojn kaj hejmon kiel la ceteraj homoj. Neniam en mia vivo mi sentis feliĉecon tiel kiam mi enpoŝigis identigilon, tiujn du ruĝajn libretkovrilojn ene de kiuj estis ankaŭ mia foto. Finfine mi povus diri fiere al la tuta mondo: Mi nomiĝsa Xhemal Rakipi.

Dum kvietaj kaj helaj noktoj, kiom foje okulumas min la karavana stelo, mi rememoras pri la vojoj, migradoj, vaganta vivo kaj pli forte premas en si mian ruĝan identigilon.

Kaj per lia dolĉa voĉo komencas sopiran kanzonon plene de plendo, kies vortoj facile sin distingas:

“Cian kabanon junulino,
mi faligos per ŝtonoj..”

Longa estas la kanzono de Nero. Longa kiel la migrada vojo trapasita enmonde de la roma karavano.

La sopira kanzono de Nero trokaptas kaj nostalgiigas la majstrojn-farbistoj: Shyqyri Beqir Fuga, Aristidh Bojaxhiu, Zeqir Dervish Zografi, Maksut Hasani ka. Tamen la silento ne tro longas.

-Nero!

- Bonvolu, fraĉjo!

Estas paŭztempo de tagmezo kaj Shyqyri Beqir Fuga volas pluen paroligi Neron:

-Ci edziĝis jam, laŭmode, amsente, bubo! Ĉu vi bonvolus rakonti nin cian amhistorion?

Nero ekridas kaj ŝatas envere rakonti tion kaj la aliaj aŭskulti.

-Plezure, majstro!

Li eksidas krucpiede kontraŭ la kamaradoj, fermetas la okulojn kvazaŭ volas fiksi la rigardon ien kaj komencas:

-Ni renkontiĝis ĉiun matenon en la karbodeponejoj. Tie ni intervidiĝis unuafoje. Ŝi sin ŝarĝis per karbo. Ankaŭ mi ŝarĝiĝis per karbo. Tamen ŝi ne estas tenda filino kiel mi. Bruna jes, sed posedas domon en Brraka. Iom pli bruna ol la blankulinoj kiuj brulvarmiĝas dumsomere surstrande ĉe borde. La patro kaj fratoj estas metiforĝistoj. De generacio al generacio ili posedis forĝejon en la Malnova Bazarro. Ili bastonbatis ŝin por ke ne edziniĝu al mi kaj forpelis kiam ŝi alvenis ĉe mi. Malbenis kaj neniu el parencaro parolis plu al ŝi. Nadire estis ja bruna kaj Brraka filino, sed estis registrita kiel ĉiuj homoj kaj posedis identigilon.

Pli koncize rakontu, Nero, vi menciis la karbodeponejojn- aldiris lin Zeqir Dervish Zografi.

Jes. Ĉe la karbodeponejoj, ĉe karbo mi enamiĝis. Tie ni intervidiĝis kaj konatiĝis. Ekde la unua tago, ĵus ni krucigis la rigardojn, mia koro ekmoviĝis. Min plaĉis multe. Mi volis daŭre vidi ŝin. Mi sentis ke mi enamiĝis al tiu bela junulino bruna, kiu aspektis blanka apud mi. La amozorgo ĉiam pli kreskis ĉe mi kiel medikago kaj involviĝis kiel trombo. Mia gajeco ĉesis, same la dormo malaperis. Malproksimiĝinte de mi, sekvante sian klienton, klinite sub la ŝarĝo portata surdorse, mi atendis ŝin ĝis la reveno. Ofte mi cedis malakceptante la ofertojn de miaj klientoj favore al ŝi. Dankeme, Nadire donacis al mi rigardojn kiuj ja pikis min ĉi tie en la koro.

Iutage mi liberigis de peza ŝarĝo kiu klinigis kaj apenaŭ faligis ŝin. Kvankam juna estis Nadire, kiel ino ne havas la bravulan forton. Mi malsuprenigis la ŝarĝon surtere. Rigardis al la okuloj.. Ankaŭ ŝi rigardis min. Senvorte mi alŝarĝis la sakon sur mian dorson kaj sekvis la klienton. Reveninte, mi trovis ŝin side sur malvasta trotuaro, antaŭ la deponejoj. Lumradio rompiĝis surmure kaj donis apartan brilon al ties okuloj. Varmiĝis sub suno samtiel kiel varmiĝas kaj malstreĉiĝas kato involvita kiel flano. Mi ĵetis sur ties intergenuojn la gajnitan monon.

-Ne, Nero- kontraŭis ŝi- la mono apartenas al ci. Estis ci kiu portis la karbon.

- Tamen tio estis via ŝarĝo, Nadire. Mi portis ĝin ĉar estis peza por vi, mia etulino. Neniam akceptu ŝarĝon je 50 kg. Ĝis 25 kg Nadire, ne pli. Ĉu ci aŭdis?

Ŝi ridis kaj redonis la monon. Ankaŭ mi ridis kaj ĵetis la monon. Finfine mi lasis kaj foriris. Poste mi eskapis de ŝiaj rigardoj. Mi ne aŭdacis vidi ŝin okulokule. Sentis min kulpa, ŝajnis al mi ke mi estis klopodanta aĉeti la amon per tri dekoj da deŝiritaj Lekoj per kiuj oni apenaŭ povus aĉeti eĉ dy paketojn da cigaredoj, sed ne la koron de juna kaj bela knabino. Iutage mi regalis ŝin per blanka bulketo kun du varmaj risoloj. Alifoje mi kondukis ŝin en dolĉaĵejo:

Elektu kaj mendu, Nadire- diris mi proksimigante al la montrofenestro de la dolĉaĵoj- Mendu kaj manĝu kiom ci volas ĉar hodiaŭ mia poŝo estas plenplena.

Kie vi gajnis, Nero?- estis demandinta surprizite Nadire.

Kaj mi, havante plenmanon da Lekoj orgojlis esti la kavaliro de ĉarma knabino, konfesis al ŝi la veron:

Ne pridubu, Nadire, kaj ne pensu pri io malbona. Ĉi mono venas el la peza laboro en la kirpiĉejo.

Nadire, kvazaŭ estus filino de granda familio, mendis nur unu tason da griaĵo. Same mendis ankaŭ mi. Tamen io okazis tiutage. Rigardante Nadire-n, mia taso falis de la manoj surcementon kaj dispeciĝis.

Oh, Nero, ĝi rompiĝis! Kiom malbone! Ni devas elpigi nun por la taso!- suspiris ŝi.

Ne gravas, Nadire! Eble tio estas bonaĝuro! Eble rompiĝis la glacio...

Kaj mi malfermis mian koron. Samtage. Vojirante. Tiel kiel estis trenata survoje nia vivo. Parolis pri mia vivo, pri la malhelaj tagoj en fremda tero, sub fremda jugo, diris ke mi havis nenion krom la deŝirita ĉemizo. Ŝi respondis:

-Mi amas cin, Nero. Mi amas tiel kiel ci estas. Ĉu vi ankoraŭ ne komprenis? Nenion diris al vi miaj rigardoj? Ci havas nenion. Sed ci havas malgrandan tendon kaj blankan koron. Kiom malgranda estu ĝi, cia tendo, mi pensas ke entenas ankaŭ min.

Mi pretis ekokupi, ĉirkaŭbraki, kisi ŝin. Tie, meze de la strato. Sed mi hontis pro la homoj. Kvankam mi ne havis nomon, sen registro, sen identigilo, mi hontis, dignon havis, ĉastecon havis..

Post iom da silento, konstatinte ke la amikoj estas lin aŭskultante volonte, Nero daŭrigis:

Nadire ne plu alvenis por porti karbon. La gepatroj enfermis ŝin hejme. Sed ŝi ne longe toleris. Forlasis la hejmon, trairis la riveron kaj alvenis en mian tendon. Tiel ni geedziĝis. Senbrue kaj senzorge. Kiel la nuptofesto en malgranda tendo, kiu apenaŭ entenas du personojn. Nun, anstataŭ la tendo, mi posedas ĉambron kun muroj, kovrita per tegoloj. Kaj gaje atendas la etan gaston naskiĝonta baldaŭ.

Kian vi dezirus, knabon aŭ knabinon?- incitis lin Shyqyri Beqir Fuga.

Ne gravas, ĉu knabo, ĉu knabino- ridetis Nero- al mi plaĉus ke ĝi similu al Nadire, estu bruna kaj ne fulgenegrita kiel mi.

Ci envane zorgas pri tio – konsolis lin Aristidh Bojaxhiu- en nia lando neniu malestimus nur ĉar ci estas nigra. Ci ja laboras kun ni kaj rekompenciĝs konforme al la laboro. Hodiaŭ loĝas en ĉambro, morgaŭ vi

posedos propran apartmenton. Per cia laboro, per ciaz monŝparaĵo ci aĉetos ankaŭ vestojn, meblojn kaj dormaĵojn.

Nero pardonpetis kaj interrompis sian majstron, Aristidh Bojaxhi.

Oni malestimadis min senlime pasintece. Nur tiu kiu estis ekster la homregistro kiel mi, povas kompreni mian zorgon kaj aferon. Senĉesa malestimo igis eĉ ankaŭ min malami ĉi tiun nigran haŭton per kiu survestis min la maljusta naturo. Feliĉaj estis niaj gefiloj naskiĝintaj sur ĉi tiu tero kaj ne dum migradoj kiel mi kaj miaj antaŭuloj. Ili atingos ankaŭ en ĉi tiu domo kiun ni estas hodiaŭ farbante.

Vidu tiun grandan nigran tabulon, sur murfaco! Ĝi estas plenigita per literoj, per numeroj, per signoj kiujn mi apenaŭ konas kaj distingas. Mia filo, ja, li konas kaj distingos ilin unuarigarde, kiel mi konas kaj distingas la ĉevalojn. Li prenos la kreton kaj ekplenigos la tabulon per tiaj signoj, ĝis li fariĝu, Dios scias, medicinisto aŭ inĝeniero. Kaj neniu diros al li: Haltu ĉi, ĉar ci estas nigra! Ĉar ĉi tie estas ankaŭ nigruloj, pli nigraj ol mi, alvenintaj el ĉiuj randoj de la mondo, el dezertoj aŭ sablejoj kie oni diras ke eĉ la pano bakiĝas subsune. Kaj ilin oni ne malestimas, kontraŭe honorigas kiel amikojn kaj fratojn.

Neniu ofendas min. Neniu malestimas min. Nur Vasil Shahini, la farbisto - mutulo, demandante nigran farbon, fingromontras jen nigran tabulon, jen mian facon. Sed tio ne ofendas min. Ĉar li agas tiel ne malice. Mi rakontos kazon kiam la malestimo ege vundis min:

Alian vivhistorion cian?- demandis Shyqyri Beqir Fuga, ridante.

Jes, tia, alia vivofragmento tio estas, majstro Shyqyri Beqir..- respondis Nero same ridante.- Tia estas mia historio, parto konsistanta el pecoj, el ĉifonaĵoj, same la infaneco kiel juneco glitintaj, pecpece laŭborde de la riveroj. Aŭskultu min, se mi ankoraŭ ne enuigis vin.

Silentis iome. El iu fenestro de la tria etaĝo, kie ili estas laborante, li ĵetas la rigardon al la urbo etendata malsupre kaj transe, kvazaŭ serĉis per sia akra okulo la lokon kie naskiĝis songo, kies foran memoraĵon li konservas kiel relikvon:

Tiutempe, kiel vi scias, invadis Albanion svarmo da italoj. Ankaŭ Tirana pleniĝis de nigraĉemizuloj. Mi havis iom pli ol dudekjarajn, knabo ĉe la kulmino de juneco. Mi deĵoris kiel ĉaristo en militista taĉmento, konsistanta el soldatoj kun kaskoj kvazaŭ supotaso kaj virkokaj plumoj sur tiuj kaskoj. Ili estis forkaptintaj niajn ĉevalojn, la draŝitajn ĉevalojn de romoj. Ankaŭ la mian. Por ke mi ne disigu min disde mia junĉevalo, mi petis ilin dungi ĉar ankaŭ mi estis forta kiel ĉevalo. Ili difinis min kiel ĉaristo. Per la ĉaro mi transportis nutraĵojn kaj vinon. Rekompence, oni donis min ŝuojn, ĉemizon kaj laborpantalonojn. Mi vestiĝis kiel soldaton. Sed soldato sen signoj. Baptis min per la nomo Nero. Tiel vestite mi iris ĉiutage al la domo de kolonelo por alporti lignon, nutraĵojn, fruktojn kaj vinon. Hejme, krom la edzino, li havis junaĝan kaj belan servistinon, itala ankaŭ ŝi. Ŝin nomis Bianka.

La belaj virinoj similas al la raraj floroj- suspiris Nero- Ili igas vin malforta kaj animsuferanta ĉar la ĉarmo ilia enradikiĝas ĉe la alies zorgo. Bela kiel stelo deŝiranta la nigran membranon de la nokto ŝajnis al mi

Bianka. Densa kaj flava hararo kiel sunradio, bluĉielaj okuloj, lipoj kiel papavaj folioj, mola kaj blanka haŭto kiel kotona burĝono. La staturo estis ne alta, sed maldika kaj malpeza kiel arbofolio, aspektigis ŝin alta. La oran hararon ŝi envolvis per vasta rubando. Vestite per nigra silka laborrobo kaj blanka kolumo-
por tiu Luno- ŝi aspektis kiel hirundo. Parolante, ŝajnis al mi kvazaŭ el ŝia buŝo elverŝis sukero. Ridis
kiomfoje ŝi vidis min. Kaj se havus pomon enmane, certe dividus ĝin po duone kun mi.

Ĉu ci alvenis, Nero?- Invitis ke mi alproksimiĝu. Kaj ridegis gaja kiam mi prezentiĝis, kiel soldaton, per tiu
glaciiginta staro kiun mi faris antaŭ la kolonelo.

Diavolo Nero! (Diabla Nero)- balbutis ŝi.

Longtempe Bianka kondukis tiel kun mi. Se la virino ridas, vi estas duone venkinta, tiel estis dirinta min iu
amuzema romo. Kaj kiam mi aŭdacis kaj diris iutage:

Ci, Bianka, estas tre bela, bellissima, ŝi ridis pli forte. Poste, dronante tiujn belajn okulojn en la tristecon-
la tristeco igis senkompare pli bela- parolis:

Ci, Nero, apartenas al roma gento migranta tra la mondo. Kiu scias cian deziron por foriri de ĉi tie kaj
vagadi de loko al loko.

Ĉu vi scias mian respondon al ŝi, post kiam mi estis drinkinta unu tason da vino tiutage?

Mi neniel povas plu migradi. Ĉar vi senbrakigis min. Vi forkaptis mian solan junĉevalon. Ĝin mi kreskigis
kaj trejnigis kiel infanon, kiel homon.

Mi komprenas cin, Nero- diris al mi Bianka- Ci malamas la italojn ĉar ili forkaptis cian ĉevalon.

Mi ne scias kial mi tuj silentis. Tiu bela knabino estis sorĉinta min. Samkiel vin sorĉas la beleco de la
plenluno kiam ĝi reflektiĝas, noktofine, sur la kvietaj surfaco de la rivero. Sur la kvietaj surfaco de la
rivero ci vidas reflektitan la plenlunon kaj la stelon alproksimiĝanta ĝin, ĉar ardas kaj sopiras interŝanĝi
du vortojn, per la ĉiela lingvaĵo, kun la sinjorino Luno.

Mi malamas italojn- susuris mi- sed ci ŝajnas bona. Ci estas pala kaj bela kiel plenluno. Come la pallida
luna..

Diavolo Nero!- koleris Bianka kaj rigardis al la okuloj ne por ridi kiel alifoje, sed pro kolero. Kial ne vidas
cin en la spegulo? Kun tia haŭto, mi apenaŭ supozis ke vi atingus ĝis ĉi tie.

Aŭskultu min, fraŭlino Bianka- replikis mi- mi ĵuras por Sankta Maria cia, per la Santa Vergine, ke mi ne
ŝercas, sed tutserioze, tutkore diris tion.

Nero malheliĝis en la vizaĝo kaj silentis.

Kio okazis poste?- persvadis lin Maksut Hasani.

Okazis io tre rara en la vivo- daŭrigis Nero same malhela kaj morna- Mi diris ke mi rakontos pri la plej granda malestimo, plej sovaĝa malestimo. La beleta italino, kiu ŝajnis al mi prudenta kaj mola, manbatis min. Tiom forte kaj tiel abrupte kiom la kvin ŝiaj blankaj manfingroj algluiĝis al mia nigra faco. Pasis jam multaj jaroj, tamen kredis min, ŝajnas al mi ke tio okazis hieraŭ.

La farbistoj, kamaradoj de Nero, esprimis sian bedaŭron kaj klopodis malpezigi ĉi tiun malnovan doloron. Nero ekkuraĝiĝis:

Ekde tiu momento mi sobriĝis, kaj kvazaŭ klera homo, mi pripensis la vortojn kaj enumerigis ĉiujn al tiu italinaĉo, kiu estis bela- tion ne povas kaŝi- kiel la pala luno naviganta je sia plezuro, dum malvarma sed hela januara nokto. Come una pallida luna. Jen kiel mi eligis torentece la vortojn:

Mi rememoros ĉi tiun manbaton, kiom mi vivos. Vi estas baptinta per la nomo Nero por humiligi min. Envane vi montras hodiaŭ la spegulon. Mi havas la okulojn surfrunte kaj vidas ke ni ambaŭ diferencas kiel la lumo al la mallumo. Ci estas laktoblanka. Mi estas karbonigra. Ci povas esti naskiĝinta kaj kreskiĝinta en palaco kun tegmento kaj pordoj. Mi naskiĝis kaj kreskiĝis sur tapiŝeto surmetita ie laŭborde de riveroj, inter la arbetoj, klematoj kaj kanejoj. Ci la parencon povas havi en belaj kaj komfortaj domoj. Mia parenco estas surborde de la rivero, sur paŝteja parto, en malnovaj kaj deŝiritaj tendoj, antaŭ kiuj ekbruliĝas fajroj per sekaj radikoj, splitoj kaj folioj. Kaj ĉirkaŭ la fajroj, kiel malfiksitaĵoj kaj putriĝintaj ŝtupoj, vidiĝas la maljunulinoj kaj aŭguristinoj aspektantaj kiel sorĉistinoj, ĉifonitaj buboj, elĉerpitaj kaj streĉitaj virinoj. Mi enviis ĉar ci estas blanka kaj bela. Hodiaŭ mi malamas per la tuta mia kolero. Mi malamas ĉin, malamas la palacon kie ci staras, ĉar malantaŭ silkaj kurtenoj de ĉi tiu palaco mi vidis la ruzecon kaj fiecon, mi malamas tutan cian parencon kaj genton.

La beleta italino ne manbatis duafoje. Ŝi rigidiĝis ĉar neniam estis vidinte min tiom kolerigita. Ne interrompis min sed lasis min ĵeti ĝisfine mian koleron.

En niaj tendoj intermiksiĝis la etuloj, malgrandaj romoj, nudpiedaj kaj ĉifonitaj kaj ofte nudaj kiel faris ilin siaj patrinoj. Nudaj sed apenaŭ ili tremiĝas kiel la viaj. Inter ĉi tiuj etaj kaj bolkruĉenigraj romoj stariĝas ĉe flamoj, povas trovi tie ĉi tie ankaŭ belaj kaj lakteblankaj infanoj kiel ci, sed nudpiedaj kaj ĉifonitaj kiel la ceteraj.

Ne miru, fraŭlino Bianka; en niaj tendoj malnovaj kaj deŝiritaj ofte alvenas viaj soldatoj..

Kiam vi promenos iudimanĉe- diris al italino- venigu ankaŭ Marion, Brunon, Renaton, kiun ajn el ili kaj pasigu laŭborde de la rivero. Proksimiĝu al la kampo kie estas la tendoj. Vi ekvidos propraokule blankajn infanojn luliĝantaj en la intergenuoj de nigraj rominoj kaj nutriĝas de bruniĝintaj manoj. Ci estas manbatinta min. Ci estas ofendinta kaj humiliginta kiel neniu alia. Sed al niaj tendoj proksimiĝu sentime. Ĉar la romo ne plinigrigas sian facon. Neniu tuŝas la virinojn... Ankaŭ li estas homo, kvankam vi humiligas lin. Ankaŭ li havas koron. Ankaŭ li havas dignon.

Niaj ĉifonitaj infanoj, fraŭlino Bianka, ploras kiel ĉiuj infanoj. Sed iliajn vekriadojn mildigas kaj sufokigas la kanzono, ne timo pro la hundoj postsekvantaj niajn karavanojn. La romo estas al kutimiĝinta dormi eĉ senmanĝinte. Sed sen kantado li apenaŭ povas dormi.

Per kanzonoj li forigas la dormon matene kaj same tiel allogas tion kial la luno laciĝas kaj foriras. Per kanzono li atendas kaj salutas la novan tagon, pretpreta por la laboro difinite de sorto. Malestimo, mizero, malsato, devigis romon etendi la manon kaj almozi. La almozon de riĉuloj niaj aĝulinoj estis obligitaj interŝanĝi per iluzioj, per aŭguro, per songoj.

Estas multaj facilanimuloj kredantaj al la nia aŭgura magio. Ofte niajn tendojn ornamas belaj virinoj, blankaj, vestite per silkaĵoj, alvenantaj por vidi sur la fabaj grajnoj, sian futuron. Kial ne venu ankaŭ vi, fraŭlino Bianka?"

"Mi ne venos!- pretrespondis la italino.- Se mi ludis kaj ridis kun vi, tion mi faris nur pro kompato. Mi kondukis tiel kiel mi farus tion kun hundo."

Mi apenaŭ eltenis. Per tremanta voĉo mi diris: " parolu ci kaj mi aŭskultos. Mi ne povas manbati ĉar ci estas ja virino. Mi malamas cin tutanime. Sed mi silentos. Mi scipovas ankaŭ ruĝiĝi. Kvankam la ruĝo perdiĝas kaj solviĝas en ĉi tiu nigra haŭta membrano. La sinjorino de kolonelo neniam ekscios pri cia rilato kun li kiam ŝi estis en Italio. Ŝi neniam ekscios ke nek ci, nek ŝi apenaŭ revidos min en ĉi tiu malbenita domo".

Mi sputis trifoje ĉe la piedoj de Bianka, forlasis la ĉaron, forprenis mian junĉevalon kaj revenis galope al mia herbejo. Mi translokigis la tendon trans la riveron, por ke min ne atingu la italoj. Tie mi komencis denove draŝi la junĉevalojn kaj fari lavotaĵojn. Mi laboris kantante. Kaj mia kanzono estis tiom nostalgia kiom eĉ dormigis la etulojn. Mi kantis kanzonojn kiujn mi orelŝtelis al italoj.

Kaj per tiel malpeza kaj belsona voĉo, tutpasje, Nero ripetis nur du versojn de iu praa kanzono napola: "Santa Lucia".

"un po di luna, un po di mare, un po di musica.."

(Iom luno, iom maro, iom muziko..)

Beata estu tiu buŝo, Nero!- diris Shyqyri Beqir Fuga, kortuŝita same kiel la aliuloj.- Ĉu vi forgesis iamfoje Bianka-n?

Kiom mi vivos, ĝis morto mi ne forgesos. Ĉar ŝi ofendis min peze. Se mi amis ŝin, tio ne estis mia kulpo. La povra koro apenaŭ estas migdalo rompebla per ŝtono. La romo same scipovas ami, kiel ankaŭ malami. Mi aŭdis ke estas enmonde virinoj blankaj el altrangaj familioj kiuj edziniĝis al nigraj romoj kiel mi. Sed, mi pensas ke tiuj romoj nigraj kiel mi estis kleraj je altnivelo da scioj kiel ĉi tiu domego farbata de mi, aŭ renomaj violinistoj kiuj kortuŝigas la staturan haŭton, per violinaj sonoj, kvazaŭ vin trafus plej danĝeraj

febroj. Alie estas klera romo, alie mi. Mi ja estis vagabonda romo, viva terloĝanto kiel mia hundo, Lordi, kiun mi lasis en la tendo ĉar mi malhavis pordon kaj seruron.

Ci havas edzinon bonegan- aldiris Aristidh Bojaxhiu.-Mi vidas ŝin ĉiutage alvenanta per la kapo mallevita kaj la okuloj surteren portante la tagmanĝon. Ci posedas ankaŭ dometon kun pordo kaj seruro. Ekkantu do roman kanzonon, Nero. Ĉar ankaŭ la kanzono estas via vivoparto.

Kiun kanzonon volas vi?

La kabanen kanzonon!- petis lin Maksut Hasani

Ne, Maksut. La kabana kanzono ne estas roma- rimarkigis Nero foje morna, foje gaja- tio estas la kanzono de la brunuloj de la kirpiĉejo. La brunuloj, kun ili ankaŭ mia edzino, sin rangas unu ŝtupon pli alte ol romoj. Ŝtupŝtupe estas ĉi mondo, fraĉjo. En la kirpiĉejo mi ellernis la kabanen kanzonon kaj kantis ĉiunokte, kiam la luno reflektiĝis sur la surfaco de la riveraj basenoj. Tio reflektiĝis pale kaj bele, meze de brilantaj steloj, kiel novedzino, bruneta en nigrula nuptofesto. Amkanzono, mia fraĉjo. Kaj ĉi tiu povra amo, estas ja malbona malsano. Tio bruligas milde- milde, malrapide, kvazaŭ tiu fajrero kiu pikas la tindron, ronĝas ĝin transformante al grateno kaj cindro.

Ni estis priparolante pri la kirpiĉejo- daŭrigis Nero.- Du kozo konsistigas la vivon de kirpiĉejo: laboro kaj kanzono. Virinoj kuspefaldaĵoj supre la genuoj, viroj nur kun kalsonetoj, nudaj infanoj, ĉiuj nigriĝintaj kaj brulvarmigitaĵoj plie pro la varmega suno brulanta kaj broganta je varmega banto. Ili laboras vicvice kiel termuŝoj. Kiel formikoj kaj kokcineloj. Laboras kaj kantas. Nenie aliloke la kanzono bolas kiel en la kirpiĉejo. La kanzono malfermas vojon al la laboro kaj la laboro per kanzono aspektas bele. Sablo kaj la koto estas ilia laboro. Ili ĝin fosas, kribrigas kaj malsekigas, knedigas kaj preparas zorgeme samkiel oni preparas la knedaĵon ŝvelitan per kikereto aŭ gisto en la kneduloj de la panbakejo de Tut Huqi. Poste ĉi tiu preparita koto tranĉatas per modeliloj en brikoj kaj tegoloj kiujn oni surmetas en vicoj kiel sovaĝanseraĵoj vicoj, sur la ebentoroj. La ebentoroj estas terpecoj plataj kaj ebenaj kiel bakiloj, sen herberoj. Sekiĝinte pro suno dumtage, oni enmetas ilin en la fornoj kie ili akiras facon, ruĝiĝas kaj bakiĝas. Samkiel la blankaj meringoj.

La kabanajn konstruis mem la loĝantoj de la kirpiĉejo, per ne bakitaj brikoj, per blankaj brikoj, kiel oni nomas ilin. Ili surmetas la brikojn unu supre la alia, sen mortero, sen koto. Malgrandaj kaj malaltaj estas tiuj kabanaj. Nur iomete pli altaj ol la hundokabanetoj.

Ĝojon kaj gajon alportas en la kirpiĉejo la malleviĝo de la suno, de la ruĝa suno kiu cirkuladas tra la firmamento kaj lacigite, foriras. En la kirpiĉejo la kotlaboristoj ariĝas kiel la abeloj en la abelujo. Laviĝas kaj eluiĝas en la ŝaumo de la riverakvo kaj venas kaj proksimiĝas al la bruligitaj fajroj. Ekkuŝas kaj drinkas brandon, geviroj kune. Kune drinkas, kune kantas, kune preĝas al la ĉielo, kun etenditaj manoj kaj svenitaj okuloj, por ke disiĝu la nuboj kaj ne enpluvu.

La kabana kanzono, kiel diris min iam onklo Mani el Elbasan, malnova kirpiĉeja majstro, estas antikva. Bruneta junulo, kirpiĉeja knabo, enamiĝis al bruneta kirpiĉeja junulino. Flirtas la junulo kun junulino kiel tion faras la virkolombo al kolumbino. Ridas, parolas kaj dorlotas la brunetulino kaj akceptas la

flormantukon kiel donacon kaj kiel signon. Tamen ŝi envere ne enamiĝintas al li. Estas serpentiginta kaj aliĝinta al aliulo, same brunulo ĉe la kirpiĉejo. Je venĝo, la junulo, moligite pro la amo, estas ĵurinta detrui la ties kabanon per ŝtono. Kaj estas plenuminta la ĵuron.

Kaj malrapide, per tiu voĉo kristaleca kaj mielĉolĉa, ĝiskantas Nero la nostalgian kanzonon de la kabano. Alveninte ĉe refreno, li mallevas kaj duonfermas liajn belajn fajrerplenajn okulojn:

“Cian kabanon, knabino,

Mi detruos per ŝtono...”

Beata cia buŝo, Nero ĉar ege plezurigis nin!- dankas lin laŭvice Aristidh Bojaxhiu, Zeqir Dervish Zografi, Shyqyri Beqir Fuga kaj Maksut Hasani. Vasil Shahin Memeci starinta silente kaj pripensinte dum la tuta rakontado, metas la manon surbruste kaj kapskuas.

Ero respondas ĝoje ridete:

Beata ja estu fratoj. Morgaŭ, same dum la paŭzo- ni elektu alian vivopecon mian.

Kaj li ekstariĝas, lerta kiel mustelmuso. Manprenas la du ladsitelojn kaj ekiras por malsupreniri por plenigi ilin per kalko. Haltas momente antaŭ la nigra tabulo. Rigardas la blankajn signojn sur ĝi kaj pripensiĝas. Poste, laŭ lia kutimo, ekridetas kaj kapskuas.

Kiu scias? Eble li imagas sian filon kun kreto enmane..

Enesperantigis:

Bardhyl Selimi

Tempo ekstertempa

Dum vintra tempo

Neĝo ne falanta

Anakronika banalaĵo

Dum somera tempo

Pluvo forgesas sian teron

Moderna puno

Tuta ĉiu tiu scienca evoluo

La ĉielon traesploras malkovrante novajn galaktikojn

Espero de la homaro por trovi la promesitan saviĝon

Post kvincent milionoj da jaroj

Ni nutriĝas per la sciencaj sukcesoj

Fantasta mondo

Kiu la hodiaŭon mortigas per veneno kaj pulvo

Per la atoma pezo

Per la sanga koloro

Per la larma salo

Skeletoj disĵetitaj kien ajn

Surtere restinte

Tiu ĉi mondo moderna

La Futuron promesas

Degelita promeso

Por translokigi la atenton ekster nian galaktikon

Tie kie ni povas atingi

Kvincent milinojn da jaroj pli poste

Tie kie la homaro la saviĝon trovos

La kapon apogos sur la polusa stelo

La dormon konforte faros

Kaj plezuron ĝuos

La neĝo kiu ankoraŭ ne glaciĝas

La seka vetero kiu pluvon ne alportas

La floro kun lipoj inflamitaj

Anstataŭ la aromo

Fumon eligas

Mi aŭguras ke finfine aperu Dio

Diris min iu amiko

Por ke atestu sian ekziston

Por la fakto kial do li permesas

Ke la ignoreco estimiĝu kiel saĝecon

La avideco kiel virton

La rabado kiel kapablecon

La ŝtelado kiel bravecon

La anarĥio kiel ordon

La malmoraleco kiel normon

La perfideco kiel lertecon

La hipokriteco kiel sincerecon

Inter la supozo pri ties ekzisto

Mi estu erara

Amen

Januaro, 2013

Mehmet BİSLİMİ

